



Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2012 numero 2-a: majo- julio 2012

dissendo je la lasta semajno de junio



Fotis Claude Gacond la 28an de aprilo 2012.

La partoprenantoj al la Ĝenerala Kunveno de SES en Vevey povis dumaniere konatiĝi kun la Lemana Lago :

Dum la matena irado al la Asembleo ĉio absolute kvietis sub belega suno. Trankvile oni povis admiri la alpan horizonton, kiun la lazura lago detalege respegulis.

Sed post la kunsido, kiuj emis repromeni lagborde, tiuj konatiĝis kun fen-venta vetero kaj kun tute alia pejzaĝo. Ondegoj energie ĵetiĝis al la promenejo. Tial malfacilis admiri la koleran lagon sen esti subite duŝita de ŝaŭmantaj akvaĵoj, se oni ne ĝustatempe forsaltis.

Mi revenis el Vevey kun du tre malsimilaj lemanaj bildoj. Kaj ambaŭ mi ŝategis : tiun de la kvieto kaj tiun de la tumulto.

# Rememorigilo

## *SES informas*

### Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,  
CH-2300 La Chaux-de-Fonds  
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch  
Tel. : hejme: 032 926 52 32  
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:  
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,  
Richard kaj Martine Schneller

## Redaktaj datlimoj

**2012 3 : julio-oktobro :**  
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.  
**2012-4 : novembro-decembro :**  
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.  
**2013-1 : januaro-februaro :**  
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.  
**2013-2 : marto-junio :**  
februare 10, dissendo 1-an de marto.

## Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

## SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue  
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj  
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.  
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

Stefano Keller, sekretario, CP 6034, 1002  
Lausanne. Tel.: 076 261 06 09. Retpoŝto:  
kellerstefano@gmail.com

Marie-Louise Münger, Rue Centrale 4, 2112  
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por  
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,  
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

### *Kontonumeroj de SES (POSTFINANCE)*

**Svisa Esperanto-Societo**  
**2300 La Chaux-de-Fonds**

**Ĉefa konto 17-581908-4**  
(por kotizoj kaj donacoj)

**VASTE kaj DIGNE 12-128564-4**  
(por subteni informadon-varbadon)

Komisiito pri financoj : Hans-Werner  
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132  
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

**Konsultu la retejon de SES !**

[www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)



## ***Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo***

*okazinta la 28an de aprilo 2012*

*en la Restoracio Restaurant du Port, Vevey (VD)*

*35 membroj partoprenas la asembleon.- Komenco je 14h15 - Antaŭ la malfermo la Svisa Esperanta Koruso kantas 6 kantojn gvidata de Elisabeth de Mestral*

### **1. Bonvenigo, konstato de la nombro de ĉeestantoj, informoj pri senkulpiĝoj**

Nancy Fontannaz, Marie-Louise Münger, Barbara Pochanke, Stefano Keller, Luko Allemand, Alain Favre kaj ankoraŭ kelkaj aliaj personoj senkulpigita de la estraro kaj de la ĉeestantoj. Ni ricevas salutojn de Stutgarto, kie okazas samtempe la jarkunveno de la esperanta klubo.

### **2. Elekto de voĉnombrantoj**

La asembleo elektas Elisabeth de Mestral kaj Gabriel Marchon.

### **3. Aprobo de la tagordo**

Ĝi estas aprobita.

### **4. Evoluo de la membraro**

SES havas 164 membrojn. Mirejo Grosjean, kun-prezidanto de SES, (poste MG) klarigas: En Svislando ĉirkaŭ 1000 homoj parolas esperante. Multaj junuloj lernas la lingvon rete. Ni vivas en epoko de individualismo. Pro tio, eble, la membraro estas malgranda kaj ne kreskas videble.

### **5. Aprobo de la protokolo de la**

### **Ĝenerala Kunveno 2011**

La protokolo estas aprobita unu- anime.

### **6. Vivo de la societo: Aprobo de la estrarraporto**

La estrarraporto estas unuanime aprobita.

### **7. Statutsanĝo:**

Artikolo 24a. Venis rimarko el la Centra Oficejo de UEA, ke tiu artikolo fakte ne kongruas kun nia statuso de landa asocio de UEA. MG klarigas, ke SES estas tute libera. Ŝi informas kiel la statuto de iu landa asocio estas esplorata fare de komisiono de UEA por konstati kongrucon kun la statuto de UEA. Post longa diskutado pri la historiaj aspektoj de tiu artikolo, la ŝanĝo estas akceptita unuanime. La nova artikolo jenas:

«Svisa Esperanto-Societo estas landa asocio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).»

### **8. Financoj**

Prezento kaj aprobo: Raportas la kaskontrolanto Dieter Rooke. Post

kelkaj demandoj la jarkalkulo estas unuanime aprobita kaj la asembleo malŝarĝas kaj dankas la komisiiton pri financoj sinjoron Hans-Werner Grossmann kaj la estraron.

### **9. Elekto de kaskontrolantoj**

2012-2013 : Dieter Rooke kaj Barbara Pochanke daŭrigos sian mandaton.

### **10. 2012: 125-jariĝo de Esperanto.**

*La projektoj por tiu jubilea jaro jenas :*

**A:** Reaperigo de la libro de Arthur Baur «*La Fenomeno Svislando*». Arthur Baur verkis tiun libron antaŭ 1979. Profesie li estis inter aliaj okupoj raportisto de Svisa Radio Internacia. Li tre bone konis la kvarlingvan literaturon de Svislando. La verko valoras ankoraŭ nun. La estraro de SES esploris pri kopirajtoj ĉe la gefiloj de Baur kaj ĉe «*Présence Suisse*», komisiono de federa departemento pri eksteraj rilatoj, kiu publikigis la libron en la jaro 1979. La estraro trovis aŭtoron, kiu konsentus verki pri la 30 jaroj inter 1979 kaj 2012. Tamen la problemo pri la kopirajtoj restas, pro tio la estraro rezignas pri tiu projekto, kiu aperas en la buĝeto en sumo de Fr 9500.-

Claude Gacond emfazas : Krome ekzistas registraĵoj de la radiaj elsendaĵoj de Arthur Baur. Li proponas, ke la koncernaj Fr 9500.- estu uzataj por registri kaj publikigi ilin. Li konas kapablulon, kiu interesiĝas kaj kapabla fari tiun laboron : digitaligi, valorigi, tajpi sub adekvata formo, por ke la publiko povu malkovri tiujn valorajn

dokumentojn.

**B:** Jam delonge Claude Gacond anoncis la intencon iel festi tiun gravan datrevenon. Pro tio venis tiu punkto en la tagordo. Li priskribas sian intencon: Diversaj prelegoj en CDELI: la unuan de septembro Claude Gacond ŝatus organizi gajan feston kun belaj tekstoj de verkistoj kiel Schwartz, Privat, Kalocsay, Auld ktp kaj kun multe da muziko. Eble dimanĉe la ĉeestontoj povus havi la okazon malkovri la regionon ĉirkaŭ La Chaux-de Fonds.

### **11. Aliaj aktivecoj por 2012**

**A)** La Grundtvig-projekto : tiu projekto kuraĝigas kaj subtenas internaciajn interŝanĝojn de plenkreskuloj. Temas pri programo de Eŭropa Unio, kiu financas ĝin. Partoprenas 4 landoj en nia projekto, kiu havas la temon «interkultura edukado, defio por Eŭropo» : Francio, Germanio, Katalunio kaj Svislando. Svislando, en la persono de MG, administras la organizon kaj enhavan aspektojn de la projekto kaj la monon, kiun SES ricevis kaj ricevos. - Pluraj aktivecoj estas planitaj :

Majo 17-20 : kunsido en Kvinpetalo en Bouresse, Francio, sub gvidado de Kristin Titgat, interpretisto, lertigisto de geinterpretistoj en aferoj interkulturaj.

Majo 26-28 : Berlino, Germanio, laŭ programo preparita de Rudolf Fischer.

Junio 29 ĝis julio 1 : Canet de Mar, en Katalunio.

Oktobro 19-21 : SFERO : Centro Le Louverain en Les Geneveys sur

Coffrane (NE), Svislando. Enhave gvidos MG.

La projekto finiĝos en somero 2013. Venas multaj demandoj de la ĉeestantoj. MG abunde klarigas. Pri la financa aspekto respondecas MG nome de SES. Tiu mono kovros tri aspektojn : Elspezojn de prelegantoj, elspezoj por fina komuna produkto, kiu estos retejo, elspezoj por repagi la vojaĝkostojn de la partoprenantoj. Partoprenantoj ricevas repagon de siaj vojaĝkosto, se ili skribas unupaĝan raporton kaj transdonas al MG la originalan trajnbileton aŭ flugbileton aŭ pruvilon de aŭtoveturado. La partoprenantoj anoncu sin ĉe MG.

Demando de Elisabeth de Mestral : La koruso planas por julio staĝon en Burgonjo. Ĉu la korusanoj povas uzi tiun monon? Esplora afero, respondas MG.

**B)** Tutmonda sesio de la KER ITK ekzameno okazos la 9an de junio 2012 en CDELI: Ĝis nun nur 2 personoj aliĝis. La minimumo estas 5 kandidatoj.

**C)** Postsomera kunveno okazos la 8-an de septembro en Soloturno, kun vizito al monto (Oberdorf), kie eblas vidi dinosaŭrajn spurojn. Poste ĉiuj ŝipveturos ĝis Bielo laŭ la rivero Aare.

## **12. Evoluo de la rilatoj inter SES kaj KCE**

La estraro de SES faras al la membraro de SES jenan proponon : Iompostioman nuligon de la ŝuldo de KCE al SES laŭ jena sistemo : ĉiun jaron KCE repagu mil frankojn kaj plie, aldone, SES malaltigu la ŝuldon

je mil aliaj frankoj. Rezulto de tio estus, ke la ŝuldo estus nuligita post 8 jaroj kaj ke SES donacus al KCE la duonon de la ŝuldo, tio estas Fr 7500.- La alia eblo estas laŭ nuna kontrakto : SES postulu repagon kompletan de la Fr 15'000.- en tempospaco de ses monatoj. Dieter Rooke substrekas, ke KCE ne havus iun problemon trovi tiun sumon tuj. La ĉeestantoj emfazas, ke SES ne devas ion donaci al KCE. La starigo de laborgrupo por prepari scenarojn por la ĝenerala asembleo 2013 estas rifuzita. Post diversaj argumentadoj la propono de la estraro estas rifuzita : 21 voĉoj por daŭrigo kiel ĝis nun, 5 por la propono de la estraro. Claude Gacond esprimas la deziron, ke la rilatoj inter KCE kaj SES iĝu denove normalaj.

## **13. JES (junularo), SIS (Svisa ILEI sekcio), SFERO (familia renkontiĝo), SAT, SATamikaro, Pasporta Servo**

Pro tempomanko oni ne traktas tiun punkton detale.

SFERO : 19an-21an de oktobro 2012 (de vendredo ĝis dimanĉo) en Le Louverain, (Les Geneveys-sur-Coffrane, NE). La prezo por infanoj estas Fr 150.-, por plenkreskuloj Fr 200.- Plenkreskuloj povos partopreni la studsabaton, kiu okazos sabate en CDELI. :

**14. Buĝeto 2012 :** Prezento kaj aprobo. La asembleo diskutas pri altigo de la sumo por varbado de Fr 2500.- al 5000.- laŭ propono de Dieter Rooke, subtenita de 4 pliaj personoj. Ĉar Claude Gacond substrekas la mankon je varbado, Nelida

Weidmann emfazas, ke reta varbado nenion kostas, konsekvence tio ne aperas en elspezoj, kaj tiu farmaniero estas moderna kaj taŭga. Voĉdono : 14 por la altigo, 8 kontraŭ la altigo.

Propono de Claude Gacond : Fr 9500.- por la valorigado de la radioelsendoj de Arthur Baur.

Voĉdono : aprobo : 19, rifuzo : 4.

Akcepto de la buĝeto : akcepto : 33, rifuzo : 1.

## 15. Diversaĵoj

1. Charlotte Blanc Maillard kaj Sonia Daubercies estas dankataj pro la organizado de la Ekspozicio pri Esperanto en la « *Magasin du Mondo* » de Vevey. Bedaŭrinde la ekspozicio fermiĝas la saman vesperon. Sed la materialo povos esti pruntedonita por ekspozicioj en aliaj lokoj.

2. La Ĝenerala Asembleo de SES en 2013 okazos la 23-an de marto en la restoracio « *Weisses Rössli* » en Staad (SG). Ni vizitos la « *Markthalle* » en Altrhein, konstruita de la artisto Hundertwasser. Okazos konkurso.

3. 2012 estas memoriga jaro pri Tibor Sekelj : vojaĝisto el la tiutempa Aŭstra-hungara Imperio. Li vojaĝis, verkis en belega stilo en la hispana, serbo-kroata kaj en Esperanto.

4. Rekomendo : la membroj de SES devus registri sin en la retlisto

«Svislando» prizorgata de Stefano Keller. Informoj cirkulas rapide per tiu maniero, sed nur dudeko da membroj de SES anas en la svisa retlisto :

<http://groups.yahoo.com/group/svislando>

5. Prelego: S-ro Privas Tchikpe el Benino prelegos la 1an de decembro 2012 en Berno pri komunikado kaj varbado. Li diplomiĝis pri juro kaj merkotiko, komunikado, en la universitato de Abomey-Calavi. Li estas la unua esperantisto en Benino. Li vizitis la jubilean UK-n de 1987 okazinta en Varsovio.

6. Eblas mem printi poŝtmarkojn rete, uzante proprajn bildojn, desegnaĵojn, tekstojn. MG montras poŝtmarkojn, kiuj surhavas la emblemon de la 125-jara jubileo de Esperanto.

7. Pri Vikipedio informas Dietrich Weidmann : ĉiu rajtas verki artikolon en la esperantlingva Vikipedio. Li mem faris grandegan kaj kompetentan laboron. La asembleo dankas lin pro tio.

<http://goo.gl/geCTD>

8. Facebook : 11'000 membroj en la grupoj esperantlingvaj !

Fino de la asembleo : 17h05.

*Protokolis Dorothee Baumgartner.*

La SES-Estraro ricevis ŝian laboron kun granda danko.

*La Statuto de SES* akompanas nian bultenon *SES informas 2012-2*.

Ĝi jam entenas la modifon ĵus deciditan okaze de la Ĝenerala Asembleo de la 28a de aprilo en Vevey.

## Enirejo de *Magasin du monde* en Vevey kun la anoncilo pri la *Ekspozicio pri Esperanto*



Fotis Claude Gacond la 28an de aprilo 2012.

Pri tiu ekspozicio ankaŭ vidu la koloran foton sur la malantaŭa kovrilpaĝo

### **Donacoj ricevitaj de SES dum la periodo 01.07.2011 - 30.04.2012**

Allemand Luc Fr 5.-, Ambassade du Soleil 10.-, Bachmann Louise 15.-, Benvenuti Maria 35.-, David Bühlmann 65.-, Dovat Lucienne 100.-, Friedly Georgette 15.-, Gaxer Walter 15.-, Glättli Ernst 15.-, Golaz Monique 25.-, Huguenin Noël 20.-, Koller Alois 65.-, Meier Hans 20.-, Morocz Piroska 10.-, Münger Marie-Louise 50.-, Scherer Paul 15.-, Vigny Marc 35.-, Viredaz Marguerite 40.-, Werner Erich 100.-, Wilson R.W. 20.-.

**Entute: Fr 675.- Ni kore dankas al la malavaraj donacintoj!**

Koran dankon ankaŭ al ĉiuj, kiuj jam pagis la kotizon.

3.5.2012/ H.W. Grossmann



# Tutsvisa aktiveco

*Redaktita de Claude Gacond*

## **Festado de la 125a jariĝo de esperanto**

Antaŭ 125 jaroj, dum la somero 1887, Ludoviko-Lazaro kaj Klara Zamenhof dissendis el Varsovio en la lingvoj rusa, pola, germana, franca kaj angla sian projekton de *Lingvo Internacia de Doktoro Esperanto*. Tiel fakte naskiĝis la lingvo baldaŭ nomata *Esperanto*. Indas digne festi tiun 125an naskiĝjaron de Esperanto precize fine de la somero 2012.

Ekzistas preciza scio, ke en La Chaux-de-Fonds la horloĝ-komercisto Philidor Wolf samjare tuj lernis la Lingvon Internacian kaj ĝin instruis al sia filo Jules naskiĝinta ankaŭ en 1887. Ambaŭ poste instigis kolegojn doni esperanto-nomon al sia horloĝ-firmao. Ekde tiam daŭre viglis la esperanto-vivo en la horloĝeja metropolo.

Krome ankaŭ en la jaro 1887 estis festata la alveno de la akvo en La Chaux-de-Fonds per inaŭguro de la testuda fontano, kaj tiama foto de tiu festo bone videbligas la horloĝ-entreprenon de Philidor Wolf, kio donos la okazon rememorigi tiun eventon per publika grupa fotiĝo antaŭ la koncerna domo ĉe la fontana placo.

La venonta bulteno *SES informas* 2012-3 dissendota la 15-an de aŭgusto, precize diskonigos la detalan programon de tiu **Festo de 125a jariĝo de Esperanto**. Sed jam nun ĉiu rezervu la daton de la 1-a de septembro por troviĝi inter la festantoj.

### **Jen la programprojekto de tiu Festado de la 125jariĝo de Esperanto**

10h00 : Kafumada ricevo de la alvenantoj en la CDELI-salono.

10h15-10h45 : Kun la jam alvenintoj kunsido de la Amikaro de CDELI.

11h00 : Grupiĝo en la aŭlo sam-etaĝa al CDELI.

11h15 : Festa malfermo kaj prelegoj:

Claude Gacond : La esperanto-fenomeno panorame.

Christoph Klawe (el Trier/Trèves DE) : Impresoj kaj esploroj pri la romano *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz.

Dominique de Mestral (el Bofflens) : *La Infana Raso* de William Auld.

13h30 : Komuna tagmanĝo.

14h30 : Grupa fotiĝo antaŭ la tiama horloĝ-firmao de Philidor Wolf.

15h00-17h00 : Publika koncerto en la Salono Charles Faller de la Konservatorio.

Interalie Elisabeth de Mestral kaj Jean-Thierry von Büren interpretos poemaron de Julio Baghy akompane de la pianisto Lorris Sevhonkian (La Sarraz).

Kantprogramo de la Svisa Esperanto-Koruso gvidata de Elisabeth de Mestral.

-oOo-



**Postsomera renkontiĝo je la sabato 8a de septembro  
organizita de Mireille Grosjean**

**Dinosaŭraj spuroj en Oberdorf (SO)  
kaj ŝipveturado de Soloturno al Bielo**

**La dinaŭsora aventuro**

Rendevuo en Soloturno je la 10h15 en la stacidomo.

Je la 10h32 ekveturo trajna el Soloturno al Oberdorf.

Je la 10h45 ni atingos Oberdorf. (Veturdaŭro 13-minuta).

De tie ni migros tra belega arbaro laŭ nedekliva vojo al loko, kie observiĝas dinosaŭraj spuroj. (Daŭro de la marŝado : inter 30 kaj 45 minutoj).

Ni revenos laŭ la sama vojo al Oberdorf (proksimume 30-minuta migrado), kie ni trafos trajnon (je la 12h46 aŭ 13h10 aŭ 13h46, tio laŭ la tempo, vetero aŭ emo) kaj trajnos al Soloturno (ree 13-minuta veturado).

Vizito de la urbo eblos post nia alveno al la stacidomo.

**La ŝipa ekskurso**

La ŝipo startas el Soloturno je la 15h15 ĉe la kvinflanka turo kaj atingas Bieron je la 18h05. Temas pri trihora agrabla ŝipveturado sur la rivero Aare.

Partoprenantoj povos rendevui en la soloturna stacidomo je la 10h15.

Alia eblo estas alveni nur por la urba vizito je la unua aŭ dua horo : per poŝtelefono ni povos informi unu la alian, kie ni troviĝas.

Alia eblo estas enŝipiĝi je la tria horo en Soloturno.

Ĉiu mem pagos sian trajn- aŭ ŝip-bileton kaj kunportos piknikon. Sed ankaŭ eblos manĝi en Soloturno en iu restoracio.

La poŝtelefona numero de Mireille Grosjean, la organizanto, estas 079 69 709 66.

Estos bona okazo renkontiĝi kaj revidi Mirejon, kiu revenos fine de aŭgusto el kvarmonata azia restado.

-oOo-

**SFERO**

**Svisa Feria Esperanta Renkontiĝo 19-21-aj de oktobro 2012**

**Ĉe la gastejo Le Louverain en Les Geneveys sur Coffrane**

**Neŭŝatela kantono, Svislando**

**[www.esperanto.ch/sfero](http://www.esperanto.ch/sfero)**

La alirvojo el Neuchâtel kaj el La Chaux-de-Fonds al la gastejo Le Louverain estas en la retpaĝo de la domo **[www.louverain.ch](http://www.louverain.ch)**. - En la vilaĝo Les Geneveys-sur-Coffrane troviĝas indikiloj. La vojo al la domo estas dekliva kaj du

kilometrojn longa. Pro la sezono indas havi vintrajn pneumatikojn. La domo staras je mil metroj super marnivelo en la ĵurasa montaro.

Kiuj alvenos trajne, tiujn ni veturigos aŭte al la domo. Bonvolu voki Mirejon telefone : 079 69 709 66. Per blogo de Mirejo oni povas kvazaŭ viziti la domon, kie ni restados en oktobro. Tiu blogero nomiĝas LE LOUVERAIN, mirejo3.blogspot.com.

En tiu renkontejo estas je dispono piano en la granda salono, du porinfanaj seĝoj kaj grandega salono. Ne ekzistas litoj por beboj. Mirejo alportos diversajn kusenojn kaj lignan trajneton. Etaj infanoj povos ludi kaj kuradi.

La planitaj aktivecoj estas : migrado en la arbaro, observo de arboj, bestoj, kolektado de folioj, ludoj.

Sabate okazos studsabato en CDELI en La Chaux-de-Fonds de la 10h30 ĝis la 16h30. La plenkreskuloj povas aliĝi al ĝi kaj organizi veturadon tien. Ili sin anoncu ĝis la antaŭa mardo.

Okazos paralele staĝo de la GRUNDTVIG-projekto, kunveno de plenkreskuloj el eksterlando kun labortemo «interkultura edukado».

Kompreneble viziteblas muzeoj en La Chaux-de-Fonds (20-minuta veturado) kaj en Neuchâtel (ankaŭ 20-minuta veturado). Tiuj vizitoj ne estos planitaj, nek repagitaj, nek inkluzivitaj.

### **Prezoj (en svisaj frankoj)**

Tuta renkontiĝo (vendredo - dimanĉo) en 2-lita ĉambro :

- plenkreskuloj Fr 200.- ; bebo senpage, infano ĝis 6 jaroj Fr 100.- infano 6-12 jaroj Fr 150.- Por ĉiu infano SES transprenos Fr 50.- por redukti la fakturon de la familioj.

En tiuj prezoj estas inkluzivitaj :

Vendrede : Vespermanĝo/Tranokto.

Sabate : Maten/tag/vesper-manĝoj/Tranokto.

Dimanĉe : Maten/tag-manĝoj.

Programo. Taksoj.

Oni povas aliĝi sub :

**[www.esperanto.ch/sfero/alighilo.html](http://www.esperanto.ch/sfero/alighilo.html)** aŭ per **[sfero@esperanto.ch](mailto:sfero@esperanto.ch)**

-oOo-

## **Prelegos sinjoro Privas Tchikpe el Benino En Berno je la sabato 1-a de decembro Allresto Bern, Effingerstrasse 20, 3008 Bern. Je la 11h00, komuna manĝo je la 13h00**

Privas Tchikpe estas oficisto en la ministerio pri laboro en Kotonuo. Li estas esperantisto el Benino, la unua esperantisto en tiu afrika lando. Li studis kaj diplomiĝis en la universitato de Abomey-Calavi pri juro, merkatico kaj komunikado. Li esperantiĝis en 1981. Poste li partoprenis kun 12 aliaj afrikanoj

en la jubilea Universala Kongreso en Varsovio en la jaro 1987. En 2009 li fondis kun Mireille Grosjean strukturon, kiu nomiĝas "Scio Sen Bariloj" (SSB), neregistaran organizon, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado. Kerna agado de "Scio Sen Bariloj" estas interalie la disvastigo de Esperanto. SSB havas UEA-konton assb-k kaj Postfinance-konton en Svislando 10-752700-3.

La prelego de s-ro Privas Tchikpe traktos jenan temon : Komunikado ĝenerale kaj komunikado pri esperanto: Trafe kaj efike komuniki estas malfacila arto. Ĝi okazos je la 11a horo kaj la partoprenantoj povos kune manĝi post ĝi, proksimume je la 13a horo.

Organizanto : Mireille Grosjean, kun-prezidanto de SES

-oOo-

## Raportoj

### **Ekspozicio pri Esperanto en *Magasin du Monde* de Vevey de la 4-a ĝis la 28-a aprilo 2012**

En Vevey duafoje la butikoj *Magasin du Monde* gastigis Ekspozicion pri Esperanto. Post tiu de la jaro 2003, kiu estis pretigita en kunlaboro kun CDELI, la ĉijara estis plene konceptita de Charlotte Blanc Maillard kaj de Sonia Daubercies. (Ilin portretas kolora foto publikigita sur la malantaŭa kovrilpaĝo) Ĝojigas la fakto, ke novaj agantoj provas malkovrigi Esperanton al nova publiko. Sub la titolo *Esperanto por mi kaj por vi* Charlotte Blanc interese raportis pri sia agado. Jen kelkaj el ŝiaj diroj :

*Esperanto. Kio estas ? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas ? Kial lerni ĝin ? Por respondi al tiuj ĉiamaj kaj al multaj aliaj demandoj, ni decidis, Sonia kaj mi, prezenti ekspozicion... Nia celo estis klarigi al ĉiuj, kio estas Esperanto. Malgraŭ la malgrandeco de la elektita loko, Sonia havis genian ideon : montri ke dum la historio de nia lingvo multaj famuloj, eĉ neesperantistaj, sciis kio ĝi estas kaj pozitive parolis pri ĝi. Ni elektis diversajn mondfamajn personojn konatajn de ĉiuj. Ne gravas, ĉu ili estas industriisto, konstruanto, sciencisto, eĉ papo kaj diktatoro. Tio montras, ke Esperanto estas vera neŭtrala lingvo sen la pezo de religio, nacieco, politikaj opinioj, ktp...*

*Ne sufiĉis montri nur panelojn, nia ekspozicio devis esti vigla, vivanta kaj bunta. Ni deziris, ke la vizitantoj havu plezuron koni la mirindaĵojn de tiu komunikilo tra ĝia historio, per muziko, libroj, kursoj, kongresoj, filmo eĉ - aludo al Charlie Chaplin vivinta en Vevey siajn 30 lastajn jarojn...*

*Tial ni proponis, ke la vizitantoj ludu kaj eltrovu, kiu diris kion, kaj aŭskultu famajn konatajn popolkantojn el la tuta mondo...*

*En la inaŭguro partoprenis pli malpli 50 personoj. Domaĝe, ke eĉ ne unu artikolo aperis en la gazetaro pri tiu evento...*

*Ekde la 4-a de aprilo ĝis la 28-a ĉirkaŭ 250 personoj vizitis nin, kaj aŭskultis nian senlacan prezentadon. En nia ora libro oni legas multe da gratuloj. Post sia vizito de la ludmuzeo en La Tour-de-Peilz, sub la gvidado de Cesco Reale, la lernejoj de « La Granda Ursino » de la Chaux-de-Fonds plezurigis nin kun sia bona kono de Esperanto... Ni dankas kaj gratulas iliajn tre kompetentajn instruistojn Monika Molnar kaj Anke Brouwer...*

*Sabate la 28-an de aprilo estis nia fermtago kun la vizito de 40 membroj de SES, kiuj venis por partopreni la Ĝeneralan Asembleon...*

*Konklude nian celon ni atingis. Nun pli multe da personoj scias, kio estas Esperanto. Ni dankas tutkore la familianojn kaj membrojn de Laŭzana Esperanto-Societo, kiuj private helpis nin...*

*Kaj jen ankoraŭ citaĵo el la konkludaj vortoj de Sonja kaj Charlotte : Kiam unu homo revas sola, tiam estas nur revo, sed se multaj homoj revas kune, jen komenco de nova realeco !*

Persone mi havis la okazon esprimi miajn gratulojn okaze de la konkluda vizito de la SES-anoj, kaj kun ili mi bedaŭras, ke nia bulteno *SES informas* ne povis anonce atentigi pri tiu ekspozicio pro bedaŭrinda tro malfrua redakta informiĝo. Kaj se la panel-projektoj estus submetitaj al nia lingva-kontrolo, certe ni estus povintaj evitigi kelkajn riproĉindajn lingvaĵojn. Tiujn estontaj utiligantoj nepre korektu. Kion mi ĉefe admiris, tio estas la didaktikaj rimedoj, kiuj aktivigis la ekspozici-vizitantojn.

La interesita lastminuta vizitinto Claude Gacond.

-oOo-

## **Tutmonda ekzamentago ankaŭ en La Chaux-de-Fonds**

La 9an de junio 2012 okazis Tutmonda KER-ekzamensesio, kiun partoprenis 356 personoj (el 380 aliĝintoj) en 29 lokoj de 17 landoj.

La ideon pri okazigo de tiu ĉi ekzamen-sesio donis la fakto, ke pluraj asocioj, kluboj, petis la eblon okazigi KER-ekzamensesion fine de la jaraj lingvokursoj por motivigi kaj samtempe rekompenci siajn diligentajn kursanojn.

Okazigi kompletajn sesiojn plurloke en la mondo estus tro malfacila tasko, eĉ nebla pro manko de sufiĉe da homaj kaj financaj fortoj. La iniciaton tamen aprobis kaj subtenis la ekzamena komisiono de UEA, proponante tutmondan, nur skriban sesion. Tiun ĉi subtenon plifortigis ankaŭ la fakto, ke la jaro 2012 estas ankaŭ la 125-jara festojaro de Esperanto, kadre de kiu okazas multaj aktivadoj mondscale en pluraj landoj.

Pri la organizado kaj reĝisorado de tiu ĉi granda evento respondecis Katalin Kovats, kiu mirinde efike trejnigis sesdekon da homoj, kiuj formis lokajn komisionojn por kovri tiun ĉi eventon en tiuj 29 diversaj lokoj. Ŝi estis je kompleta dispono de la lokaj organizantoj monatojn antaŭ la evento kaj restis ankaŭ dum

la ekzamensesio, kiu estis sufiĉe longa, konsiderinde ke pro la diversaj horaj zonoj la ekzameno disvolviĝis en du partoj. Katalin zorgas ankaŭ pri la post-sesijaj kunordigoj de diversaj taskoj diverslande.

Svislando troviĝis inter la landoj, kiuj respondis pozitive al la unua alvoko. La loka organizanto, Monika Molnar, elektis CDELI-n en La Chaux-de-Fonds kiel la lokon de la ekzameno, kiun la plejmulto de la svisaj esperantistoj bone konas kaj vizitas aŭ regule aŭ de tempo al tempo. La svisan sesion partoprenis 10 kandidatoj, kiuj plejparte estis regulaj partoprenantoj de la surlokaj studsabatoj, al kiuj aldoniĝis kandidato el la najbara Francio kaj 3 gelernantoj el la loka lernejo La Granda Ursino (La Grande Ourse), kie Esperanto estas regule instruata. Estante en la eŭr-azia parto de la ekzamen-sesio, en La Chaux-de-Fonds ĝi komenciĝis je la 9a horo kaj daŭris respektive 2, 3 kaj 4 horojn laŭ la niveloj B1, B2 kaj C1.

Flanke de la gazetaro, dum la ekzameno ni havis la viziton de ĵurnalisto de "*Le Quotidien Jurassien*", kiu skribis atentokaptan artikolon pri la evento. Ankaŭ aperis artikolo en "*L'Impartial*".

Ni kore gratulas la kandidatojn, kiuj havis la kuraĝon alfronti la skriban KER-ekzamenon kaj por tio ofertis sian sabatan antaŭtagmezon la 9an de junio. Ni forte esperas, ke iliaj klopodoj alportos al ili la bone merititajn rezultojn, kiujn eblos ekscii pli-malpli ene de 3-4 semajnoj. (Tiu periodo povus ŝajni longa, sed ni ne forgesu, ke por la korektantoj temas pri korektado de plurmil paĝoj.) Fine, sed ne laste, niaj apartaj dankoj iru al Danielle Carrier, nova kunlaboranto de CDELI, kiu efike helpis dum la tuta sabata ekzamenperiodo.

Venontfoje, okaze de simila organizado de ekzamen-sesio, ni esperas, ke venos esperantistoj ankaŭ el aliaj regionoj de Svislando por testi sin mem kaj/aŭ antaŭenigi la prestiĝon de Esperanto kiel la ĉi-jaraj pioniroj. Per ilia partopreno en la ekzameno, Svislando atingis la 10-an lokon en la laŭlanda listo (kun prioritato al la nombro de la kandidatoj). Por pli da informoj rilate al tiu ĉi tago aŭ al la ekzamenoj ĝenerale, vizitu la paĝaron edukado.net: <http://edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/raporto>, kie sub "Gazetaraj komunikaĵoj" vi povas legi ankaŭ la ĵurasan artikolon en la franca.

Monika Molnar

(La malantaŭa kovrila paĝo vidigas, kiel diligente laboris la ekzamenatoj !)

-oOo-

## SFERO 2011 en Richterswil



En oktobro 2011 kunvenis 50 personoj el Svislando kaj eksterlando en Richterswil apud Zuriko. Beboj, infanoj, junuloj diskutis inter si en Esperanto laŭ sia maniero. Gepatroj havis ankaŭ multajn spertojn por interŝanĝi.

Teatro okazis sub la gvidado de Christoph Frank kaj Wolfram Fischer. Paperfaldado laŭ japana tradicia arto « origami » okazis laŭ gvidado de Kimie Markarian. Promenado al infana bestoĝardeno Knie en Rapperswil ĝojigis la infanojn, kaj ne nur ilin.

Paralele okazis renkontiĝo de la Grundtvig Esperanto-Projekto. Plenkreskuloj povis migri el SFERO al Grundtvig sub la sama tegmento kun profito.

La belega domo ĉelaga ofertis agrablajn lokojn ; abundaj ludiloj troviĝis en la parko ; tamen la suno mankis. Ĉion oni ne povas havi.

Denove ni povis konstati, ke SFERO estas tre sukcesa renkontiĝo. Kutimaj partoprenantoj venas fidele, novuloj aldoniĝas. Vigla amika etoso.

La organizantoj ricevu elkorajn dankojn.

Mireille Grosjean

# Kulturaj paĝoj

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20, 2000 Neuchâtel,  
rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## 125 jaroj Esperanto – kiel plu ?

*Bruno Graf*

En 2012 la esperanto-movado festas tiun jubileon kaj uzas la okazon por atentigi foje pli pri la Internacia Lingvo, kiu riskas esti forgesita. UEA nomumis laborgrupon sub la gvido de Brian Barker, kiu kunordigas la agadon por konatigi esperanton, ĉefe per adekvata informado. Ankaŭ multaj landaj asocioj partoprenas tiun jubileon kaj planas agadojn por informi la publikon. En la reto Renato Corsetti komentas ĉiujn farojn kaj kuraĝigas la agantojn. Ŝajnas, ke nova vento trairas la movadon.

Efektive montriĝas multa aktivismo, dum principaj strategiaj impulsoj forestas. UEA sekvas laborplanojn kaj komisiono prilaboras strategiajn demandojn. Ĉu tio sufiĉas? Depost la manifesto de Prago en 1996 ne plu estas lanĉita granda projekto. La lasta prezidanto kun strategiaj ambicioj estis Humphrey Tonkin. 125 jaroj esperanto estu la motivo por analizi la situacion, ĉar esperanto ne sufiĉe kreskas. Danke al interreto nia lingvo iom prosperas, sed estas malfacile rikolti la fruktojn.



En la rusa revuo *La Ondo de Esperanto* aperis kelkaj interesaj artikoloj pri la stato de esperanto. Trevor Steele konstatas, ke la esperantistoj ne havas la forton antaŭenigi la aferon. Giorgio Silfer prezentas elstare la Civiton kiel novan Esperantion. Grigorij Arosev skribas, ke esperanto ne plu estas bezonata, ĉar la angla nun funkcias kiel internacia helplingvo. José Vergara forĵetas finvenkismom kaj raŭmismom favore al plivastismo. Restas la ĉefa argu-

mento de UEA, ke nur esperanto kondukas al lingva justeco en mondo, kie la angla dominas.

Ĉu la filozofio de la Civito estas supera? Ĝi estas la rezulto de la evoluo, tezo kaj antitezo. Forlaso de tro alta celo kaj malkovro de la propraj valoroj. La Civito kreis ŝtat-similan sistemon kun sektecaj trajtoj, kiu similas al planludo. Estas interesa intelekta klubo kaj podio por ideologoj. Bedaŭrinde ĝi ne kunlaboras kun UEA, ja male atakas ĝin senfine. Ĉiam la sama melodio: raŭmismo kontraŭ finvenkismo – cetere la lasta ne estas formala celo de UEA. Temas pri kurioza teoriado, ĉar organizitaj finvenkistoj apenaŭ ekzistas. La ĝisnuna evoluo montras, ke la Civito estas interesa skolo, sed ne danĝero por UEA. Iom da konkurenco eĉ stimulas. Kaj la evoluo pludaŭras.

Ĉu komuna supera strategio eblas? Oni povas dubi pri tio, ĉar la opinigvidantoj ne povus unuiĝi kaj la esperanta komunumo tro individualiĝis. Almenaŭ ene de UEA la komitato devus rediskuti funde pri adekvata strategio kaj redifini la pozicion de esperanto rilate al la angla. Ĉu esperanto povus ludi akcesoran rolon apud la angla, kompletigante kaj ne kontraŭante ĝin? Indus eltrovi kaj difini tiun rolon kaj modernigi la aperbildon, ĉar eksteruloj konsideras esperanton kiel muzeaĵon: Ne estas dubo, ke esperanto estas pli taŭga internacia komunikilo ol la angla. Eĉ eksteraj granduloj kiel Eco kaj Grin konfirmus tiun pretendon. La hipotezo de esperanto kiel internacia

helplingvo ekzistas plu, ankaŭ se tiu esprimo estas malŝatata.

Depost 1887 la mondo politike, ekonomie kaj socie tute ŝanĝiĝis. Hodiaŭ ankaŭ Zamenhof venus al novaj konkludoj. Liaj deklaroj restas historie gravaj. Nun ni bezonas horaron por la 21-a jarcento. Ni ne havas dogmojn kiel la katolika eklezio kaj povas fari strategiajn reformojn. Tiel ni ankaŭ pli facile elirus nian geton. Tazio Carlevaro jam en 1999 skizis la situacion en la studo «Ĉu esperanto postvivos la jaron 2045?».

Aliflanke estus naive kredi, ke esperanto rapide progresus, se ni havus adekvatan strategion, sed oni povus argumenti pli konvinke kaj komprenigi sin pli bone. Ni povus ankaŭ informi kaj varbi pli kredinde. Estus utile, se eksteraj specialistoj pri komunikado helpus trovi la novan direkton, ĉar ni estas kaptitaj en la tradiciaj pensmanieroj. Transalti la ombron, kiel oni diras germane, estas malfacile.

La perspektivo ne estas brila, tamen oni povas esperi. Dum 125 jaroj esperanto montris mirindan vivoforton. Spite de skismoj, mond-militoj, subpremo de diktatoroj kaj sen ŝtataj subtenoj la lingvo evoluis kaj fortiĝis. Multnombraj pioniroj dediĉis sin libervole kaj fervore al tiu tasko. Bela ekzemplo estas nia Claude Gacond, por kiu esperanto estas la plej natura afero en la mondo. Multe estos farenda. Esperantistoj opinias ofte, ke nia lingvo estas tiel perfekta, ke ĝi devus progresi aŭtomate. Ne, esperanto ne estas speco de *perpetuum mobile*.



## Ankoraŭfoje pri René de Saussure kaj Arthur Baur

*Andreas Künzli*

*Pri la armea uniformo de René de Saussure, frato de la mondfama lingvisto Ferdinand de Saussure, lia unua edzino kaj lia unua filo kaj pri la sekreta lingvo de la familio Baur.*

### 1. Pri la armea uniformo de René de Saussure

Post kiam antaŭnelonge mi ricevis de iu rusa interlingvisto la peton, ke mi provu ekscii trajtojn kaj detalojn pri la armea uniformo de René de Saussure (1868-1943), laŭ ĉi tiu fotografiaĵo (publikigita en la Svisa Enciklopedio Planlingva) :



mi skribis unue al la Svisa Oficira Societo en Zuriko, kie oni rekomendis al mi kontakti la Svisan Armean Bibliotekon en Berno (kiun mi ankaŭ vizitis). Mi tion faris, kaj post nelonga tempo mi ricevis la

petitajn sciigojn, ĉar René de Saussure estis trovita en iuj malnovaj libroj, laŭ kiuj oni povas difini liajn armeajn ecojn, kiuj estis ĝis nun nekonataj. Do, laŭ la koncerna dokumentaro havigita al mi, povas esti rikoltitaj jenaj informoj pri la armea aparteno, armeospeco, uniformo kaj la rango de R. de Saussure : Ĉar sur la *kolumo* (kiu estis probable skarlatruĝa) de la armea kitelo de R. de Saussure oni povas rekoni *flaman bombeton*, kiu estis brodita per *orkolora fadeno* sur nigra tuko, tio signifas, ke la portanto de tiu uniformo apartenis al la *artilerio* (en 1913 R. de Saussure apartenis al la kanonista kompanio 15 kaj en 1917 al la pieda artilerio, kompanio 11). Pri la koloroj de la siatempaj uniformoj informas la armea regularo kaj la disponeblaj ilustraĵoj en la koncerna fakliteraturo. Sur la *aksela klapo* troviĝis *arĝenta(j) stelo(j)* kun la svisa kruco (probable sur orfadena fono aŭ origita metalo kiel la koloro de la vestajaj butonoj, kun skarlatruĝa rubando), kiø signifis, ke oni estas *oficiro*. Laŭ la indikoj trovitaj en iuj malnovaj listoj (nomaroj) de la svisa armeo, René de Saussure estis unue *leŭtenanto* (en la jaroj 1900-1, kun 1 stelo) kaj poste *ĉefleŭtenanto* (en la jaroj 1902-17, kun 2 steloj). Intertempe, en 1913, R. de Saussure ŝanĝis la loĝlokon kaj iris de Ĝenevo al Berno ; tiam li servis en kompa-

nio, kiu dum la mondmilito lokiĝis en la (franclingva) berna Ĵuraso. Ĉar en postaj listoj René de Saussure ne plu aperas, oni povas kredi, ke li ekŝiĝis el la svisa armeo fine de la unua mondmilito, do en 1918; en ĉi tiu jaro li atingis ankaŭ la 50an jaraĝon, kiu estas la aĝlimo por forlasi la svisan armeon. Cetere, la t. n. *bunta uniformo*, kiu estis utiligita en la armeoj de Eŭropo en la 19a jarcento, validis oficiale ĝis 1914, kiam la *malhela blua* koloro de la vestaĵo estis anstataŭita de la nova verdgriza (germanlingve: feldgrau) koloro, por unuecigi la uniformojn. Ĉar R. de Saussure ne portas ĉapon sur tiu ĉi fotografiaĵo, kies dato ne estas konata, ni povas imagi ĝin nur laŭ la priskribo en la koncerna fakliteraturo, aŭ laŭ la tiam validaj regularoj. Lian fraton Ferdinand de Saussure mi ne trovis en la oficiraj listoj, kio signifas, ke plej verŝajne li ne faris armean karieron.

### **Pri la edzinoj kaj filoj de René de Saussure**

Tra aliaj kanaloj mi trovis kelkajn biografiajn indikojn koncerne la unuan edzinon kaj filon de René de Saussure. Laŭ tio, la unua edzino de René de Saussure nomiĝis *Catherine Amélie Maurice*. Ŝi naskiĝis la 12an de decembro 1874 en Ĝenevo (Svislando) kaj forpasis la 13an de aprilo 1899 en Vaŝingtono (kolumbia distrikto), Usono, do en la aĝo de 24 jaroj. La paro geedziĝis la 17an de junio 1898 en Genthod, Ĝenevo. La gepatroj de René de Saussure estis Henri Louis Frédéric de Saussure (1829-1905) kaj Louise Elisabeth de

Pourtalès (1837-1906). Informojn pri la gepatroj oni trovas en la interreto.

La unua filo de René de Saussure (kaj de Catherine Amélie Maurice) nomiĝis Jean de Saussure. Li naskiĝis la 11an de aprilo 1899 en Vaŝingtono, Usono, kaj forpasis la 11an de januaro 1977 en Thônex, Ĝenevo. Li apartenis al la protestanta Libera Eklezio. En 1923 li edziĝis al Liliane Elisabeth de Crousaz, filino de Roger Amédée Edouard, kaj en 1968 al Jeannine Madeleine Hummel, filino de René William. Jean estis pastoro en Edinburgo, en Eaux-Vives, Ĝenevo (1926) kaj en la katedralo Saint-Pierre de Ĝenevo (1929-44), poste docento de la libera teologia fakultato de Laŭzano (1944-49), kaplano (aumônier) de la komunumo de Grandchamp (1949-54) kaj pastoro en Cologny (1954-64). Remalkovrante la teologion de Kalvino, Jean de Saussure kontribuis al la revivigo de la reformitaj eklezioj. Li elpaŝis ankaŭ kiel pioniro de la dialogo kun la katolikoj, partoprenante en la ekumena grupo de Dombes kun abato Paul Couturier (1937) kaj estis unu el la spiritaĵ fondintaj de la komunumo de Taizé. Li estis la aŭtoro de multnombraj libroj kaj honora doktoro de la universitatoj de Debrecen (Hungario) kaj St. Andrews (Skotlando).

La dua edzino de René de Saussure estis Viola Anna Helena Heer (nask. 9.9.1901-?). En la bernaj civilaktoj estas indikita studentino kiel profesio kaj ke ŝi forlasis Bernon en 1923 en la direkto de Zuriko. Viola loĝis ĉe la gepatroj en Lombachweg 27, dum René de Saussure mem vivis en Lombachweg 15. René

de Saussure forpasis la 2an de decembro 1943 en Dahliaheim en Berno kaj estis entombigita en familia tombo en la berna tombejo Schlosshalde (la tombo ne plu ekzistas). Dahliaheim estis privata kliniko por pacientoj kun nerva malsano kaj skizofrenio. Krom ke li naskiĝis menskripla, pri la dua filo de René de Saussure mi trovis neniujn informojn.

## 2. Pri la lingvo *Noyssel* de la familio Baur

SinJORINO Irène Thomann, kiu respondis al mi nome de la Svisa Oficira Societo en Zuriko, kie ŝi laboras en la sekretariejo en la rango de kapitano, estis neniu alia persono ol la filino de d-ro Arthur Baur, nia eminenta kaj neforgesebla svisa esperantisto, kiu forpasis en 2010.



*Heidi kaj Arthur Baur-Sallenbach dum elsendo en SRI.*

(Foto : Svisa Radio Internacia SRI en arkivo de CDELI)

SinJORINO Thomann havigis al mi interesan materialon, pri kiu ĝis nun oni nenion sciis. Temas pri vortaro de la artefarita lingvo *Noyssel*, kiu estis speciale kreita de d-ro Baur kvazaŭ kiel sekreta familia lingvo.

La ekzistanta vortaro kun 1700-1800 vortoj baziĝas ĉefe je la sekvaj nacilingvoj : litova, gota, sveda, islanda, romanĉa, ankaŭ angla, franca kaj aliaj. Temas pri tiuj lingvoj,

kiujn Arthur Baur mem studis, plej bone konis kaj science esploris. En la lingvo *Noyssel* Esperanto ludas praktike neniun rolon, kaj elementoj de *Noyssel*, ekzemple kelkaj ĝiaj finaĵoj, montris nur hazardan koincidon kun Esperanto, sed ili pli similas al la gramatiko de la supre menciitaj lingvoj. Do, la infinitivo de la verboj finiĝas je -i (matiti = rigardi), la imperfekto je -o (matito), la futuro je

-e (matite). La substantivoj ofte finiĝas je -as (vaikas = infano) – depende de la origino de la vorto. La adjektivoj finiĝas je -us aŭ -as, kun esceptoj (ekz. raudonesel = roz-

kolora). La supersignoj estas kiel en Esperanto. Cetere, *Noyssel* signifas freŝa, ekzemple: noyssel duona (freŝa pano).

La sekva tabelo prezentas elektitajn vortojn el la vortlisto de la baŭra lingvo *Noyssel*. (La vortproporcio tute ne estas ekvilibra, kiel ŝajniĝas la suba tabelo; relative multaj vortoj estis ĉerpitaj el la litova, gota kaj sveda, pli malmultaj el la islanda kaj romanĉa, aliaj el restantaj lingvoj – proksimume en tiu sinsekvo.) La prefero de la litova, gota kaj islanda lingvoj atestas, ke Arthur Baur devis esti ege fascinata pri la praaj hindeŭropaj lingvoj.

*El la litova*

nuotykis (aventuro)  
malonus (agrabla)  
darbas (laboro)  
dirbti (labori)  
statyti (konstrui)  
pilis (kastelo)  
praŝyti (peti)  
knyga (libro)  
mokslininkas (klerulo)  
miestas (urbo)  
geltonas (flava)  
draugija (societo)  
laimė (feliĉo)  
ragana (sorĉistino)  
tarptautiniskas  
(internacia)  
nuoŝimtis (procento)  
sniegas (neĝo)  
parduoti (vendi)

*El la islanda*

kvöld (vespero)  
byrjati (komenci)

haitanti (inviti)

vör (litro)

*El la gota*

ains (sola)  
merzjanti (ĉagreni)  
nasjantomu (kuracisto)  
siuns (baldaŭ)  
wamba (stomako)  
laufs (folio)  
hulistr (litkovrilo)  
huljanti (kovri)  
haims (vilaĝo)  
glaggwus (ekzakta)  
skir (hela)  
lausjanti (solvi)  
gaidw (manko)  
tagl (haro)  
bugjanti (aĉeti)  
skapjanti (krei)  
brino (febzo)  
mims (karno)

*El la romanĉa*

skort (brava)  
esan (azeno)

ĉiern (pinto)

ardaint (proksima)

*El la sveda*

röstati (voĉdoni)  
skifti (ŝanĝi)  
björn (urso)  
mötati (renkonti)  
järn (fero)  
märnög (fervojo)  
tilltrasslat (komplika)  
lekamen (korpo)  
stöj (bruo, antikva sveda)  
dimma (nebulo)  
sillnad (diferenco)  
galen (freneza)  
moln (nubo)  
mask (vermo)  
öken (dezerto)  
vittne (atestanto)  
slump (hazardo)  
oska (tondro)

*El aliaj lingvoj*

bra (brako, franca)  
ĉung (eble kurbo, aŭ eble pafarko, ĉina), sed la sama vorto signifas ankaŭ ĉina  
puzzi (fontano, althochdeutsch)  
mos (makulo, svisa)

slökkvati (estingi)	pulit (afabla)	lekarna (apoteko, ĉeĥa)
swumfsl (lageto)	ĉilüdra (vakcinio)	maslo (butero, rusa/slava)
dius (besto)	sted (somero)	koris (kasko, greka)
diwan (morto)	aŝĉer (malpura)	grandina (hajlo, itala)
töng (tenajlo)	padriöl (funelo)	neos (juna, greka)
skrau (katalogo)	melŝkort (maldeca)	ail (ajlo, franca)
stova (oficejo)	nanin (nano)	kjedeti (enui, dana)
mynd (ideo)	glaĉ (glacio)	vezir (ministro, turka)
simi (telefono)	ŝkadiale (ujo)	ŝang (respekto, ĉina)

*Aliaj interesaj vortoj :*

patshugel (egoisma)  
venhüle (elemento)  
fonhug (fanatikismo)  
plepletems (babilema)  
Ruselžeme (Amerika, žeme estas  
baltdevena; z analoge al la  
supersignoj en Esperanto)  
Ruselŝalis (USA)  
Glaĉŝalis (Islando)  
Musselŝalis (Italio)  
Helvelŝalis (Svislando)

*Svisaj kantonoj :*

Örngawi (Argovio)  
Kvickgawi (Appenzell)  
Helvelpelt (Schwyz)

Lidugawi (Turgovio)  
Pirmgawi (Uri)  
Järnratasgawi (Zug)  
Ŝtedpelt (Zuriko)  
Hasopelt (Bazelo)  
Hasoŝalis (Baselland)  
Björnpelt (Berno)  
Avispelt (Schaffhausen)  
Zaipelt (Lucerno)  
Zoppigawi (Tiĉino)  
Semjanggawi (Valezo)

*Numeraloj 1-10 :* vän, dvi, kill, foll,  
lull, mäll, vall, schöll, züll, väns  
dvis = 20, kills = 30, folls = 40, lulls  
= 50 ktp.

S-ino Thomann skribis, ke ŝi ankoraŭ nun kapablas utiligi ĉi tiun lingvon, kelkfoje por fari notojn. Laŭ mia peto ŝi bonvolis traduki kelkajn frazojn, ekzemple :

Je süüt (mi ŝvitas)  
Ŝirdisel goljanŝ (korajn salutojn)  
Dailus goljanŝ (belajn salutojn)  
Dailus kvöld (belan vesperon)  
Ŝidina bu ven dailus dina (Hodiaŭ  
estas bela tago)  
Rytoj ray ei im toitelŝalis (Morgaŭ ni  
iros al Germanio)  
I rail razn di lu daug spos (En nia  
domo ekzistas multaj gazetoj)

Jel tevas buto efĉuritsjori is ven  
megas spa (Mia patro estis  
ĉefredaktoro de granda gazeto)  
Je dirbt pas ven žinotas draugija (Mi  
laboras ĉe konata svisa societo)  
Je fagnet jog yü raŝit ven lemelis pri  
rail gatulingafrazda (Mi ĝojas, ke vi  
skribas artikolon pri nia familia  
lingvo)  
Iki pasimatimo! (pura litova lingvo)  
Ĝis revido!

# Recenzoj

## *Mia stelo* – emociiga rakontaro el la holokaŭsta literaturo en Esperanto

*Andreas Künzli*

Kiu en la 1920aj jaroj naskiĝis kiel judo en Pollando, spertis verŝajne relative senzorgan kaj feliĉan junaĝon, sed post 1933 riskis travivi la inferon – kaj perdi sian propran vivon. Tiun sperton faris ankaŭ Felicja Raszkin-Nowak, naskita la 23an de decembro 1924 en Varsovio, kiu rakontas sian tragikan vivhistorion en la libro *Mia stelo*. Al la ideo noti siajn rememorojn ŝi venis en 1989, kvindek jarojn post la eksplodo de la 2a mondmilito. Al ĉi tiu decido konvinkis ŝin pensoj pri la jaro 1968, kiam en ŝia pola patrujo denove ekflamis ondo de antisemitismo, kaŭzanta amasan forveturon de judoj, kiuj estis savitaj dum milito. Fine de 1971 ŝia familio forlasis Pollandon kaj iris al Kopenhago, Danlando, kie la vivo devis esti rekomencita.

La libro fariĝis 17-ĉapitra emociiga rakontaro, kiu komenciĝas per la infanaj jaroj de la aŭtorino kaj kiu finiĝas per epilogo kaj kompletigo. En la 30aj jaroj Felicja Raszkin vigle frekventis la lernejon. En la lernejo ŝi interesiĝis antaŭ ĉio pri historio, volonte ŝi skribis taskojn en la pola lingvo, allogis ŝin geografio kaj la matematikon ŝi ne ŝatis. Felicja Raszkin sukcesis aliĝi al la gimnazio, kvankam tio kostis al ŝiaj gepatroj multe da mono. La 12an de majo 1935, ĉe la stratoj vidiĝis na-

ciaj flagoj, mallevitaj ĝis la duono de la mastoj, kaj sur ili flirtis longaj, nigraj rubandoj. La homoj portadis funebrajn bendojn sur la brakoj. Tio signifis, ke forpasis la pola Gvidanto Józef Piłsudski. Erao en Pollando finiĝis. La mondo de Raszkin estis ankoraŭ malgranda, tiel ke ŝia vivo turniĝis preskaŭ nur ĉirkaŭ diligenta lernado. Same kiel en la popollernejo ĉiuj lecionoj estis en la pola lingvo. Inter la fakoj troviĝis la religio kaj la historio de la judoj.

Deviga fremdlingvo estis la germana, kaj post la lecionoj eblis kromlerni la hebrean kaj la anglan, sen notoj en la diplomo. Sabate ŝi ne vizitis la gimnazion.

### 1933 kaj la sekvoj

Post 1933, kiam Adolf Hitler akaparis la povon en Germanio, la etoso malsereniĝis ankaŭ en Pollando. Kio sekvis, estis neimagebla kaj apenaŭ kredebla. Vespere la patro de Felicja Raszkin legis *Mein Kampf* kaj kun ĉagreno konsideris la aktualajn politikajn eventojn en la mondo. Tio tre maltrankviligis la gepatrojn, kiel la aŭtorino memoras. Ili ĝuste antaŭsentis la militan tragedion, kiu baldaŭ atingos ankaŭ Pollandon.

Do, la bela epoko finiĝis subite la 1an de septembro 1939, kiam la armeoj de la nacisocialistoj enpenetris Pollandon por konkeri ĝin kaj per-

sekuti la popolojn tie vivantajn, antaŭ ĉio la judojn.

Post la bombado de Varsovio Felicja Raszkin fuĝis en orienta direkto, al Bjalistoko, kiu estis ŝia dua familia urbo, kie vivis la avinjo kaj multaj parencoj kaj kie restis la paĉjo. Por kuniĝi kun ili necesis transiri la riveron Bug, kiu samtempe formis la limon kun Sovetunio, ĉar la oriento de Pollando estis okupita jam de la sovetia armeo.



Mia stelo de Felicja Raszkin-Nowak

### En Bjalistoko

En sekvaj ĉapitroj Felicja Raszkin priskribas la etoson en Bjalistoko sub la sovetia kaj poste sub la germana regadoj. Kiaj teruraj tempoj! La novaj mastroj detruis ĉion antaŭan kaj trudis sian propran politikan sistemon. Ni ĉerpu iom el la teksto.

« Ni estis ĉe la sovetia flanko. Ni ekiris tra la urbeto. Ĉi tie estis multe da fuĝintoj, kiuj staris sur la placo kaj interparolis pri siaj travivaĵoj dum la germana regado. Ili fiksis kun la koĉeroj la veturprezon, planis

ion por la estonteco. Tranokto kun kusenego donis kvietan dormon post la elĉerpa longa vojaĝo. Matene mi rigardis marŝantajn rusajn soldatojn, kiuj ankaŭ estis invadintoj en nia patrolando. Vestitaj per longaj manteloj sen orlita rando, ilia cindrobruna koloro fandiĝis kun grizo de la pavimo. Sur la kapoj ili havis ĉapojn kun pinto meze kaj kun pendantaj ŝirmiloj, kiuj balanciĝis kiel azenaj oreloj. Multaj vizaĝoj estis kun mongolaj okuloj, iom plataj nazoj kaj larĝaj vangostoj. Unuafoje ni vidis tiajn homojn. Ili ne havis epoletojn kun rangoj, kaj nur malgrandajn triangulojn sur la kolumnoj kaj estis malfacile je la unua vido distingi oficiron de soldato. Ili ne similis polajn kaj germanajn militistojn. Ĉiuj ĉi junuloj rigardis serioze kaj eĉ kiam ili kantis, ili ne ridetis. La komunajn kantojn interrompis lirikaj voĉoj de solistoj. »

« Interesis nin la situacio en Bjalistoko. Post mallonga ripozo ni devos aliĝi al la nova vivo-ritmo. La urbo estis ŝtopita de fuĝintoj, ĉefe judoj, kiuj timis persekutadon en Polujo okupita de hitleranoj. Ili serĉegis ian savon por si. Plej multajn oni lokis en la malnova sinagogo. Ili nestiĝis en primitivaj kondiĉoj kaj granda mizero. (...) La paĉjo komencis laboron kiel librotenisto (...). La panjo havis malgrandajn ŝancojn por labori en la profesio de kosmetikistino. (...) Ŝanĝiĝis la etoso kaj la kondiĉoj. Ĉio griziĝis. Neniu pimpigis sin, krom rusinoj – oficiraj edzinoj. (...) La lernejoj estis malfermitaj, sed reformitaj laŭ la sovetia dekjara instruprogramo. (...) La instruado estis okazanta en la

pola lingvo, sed aldoniĝis du novaj lingvoj – la rusa kaj belorusa, kaj ankaŭ la germana kiel fremdlingvo. (...) Pri ĉiu lernejo zorgis rusa milita trupo. Do, ofte vizitis nin oficiroj kaj ili aŭdigis sian prelegetojn, kaj grupoj de talentaj lernantoj estis invitataj al prezentadoj antaŭ soldatoj. Ni devis partopreni ĉiam pli longajn solenaĵojn en diversaj festotagoj kaj atendi nian vicon. Sed estis bona publiko. La rusaj soldatoj akceptadis nin kore kaj dankeme aplaudis. Ili regalas nin en sia kantino, donis al ni dolĉaĵojn. La provizado de la vendejoj estis modesta, ĉiam mankis io, sed laŭ sovetia kutimo oni aranĝis specialajn liverojn okaze de la ŝtataj festoj. Do, ni omaĝis la 1an de Majo kaj la Oktobran Revolucion ne nur per ruĝaj flagoj, sed ankaŭ per mandarinoj, halvao kaj bombonoj. (...)

Sekvis ankaŭ gravaj ŝanĝoj en la familia vivo. La domon de ŝia avinjo oni ŝtatigis. Do, oni devis forlasi la loĝejon, kaj la tutan frontparton okupis sovetiaj militistoj. En la alo oni restigis onklinjon Annan kaj oĉjon Jakobon Ŝapiro, la esperantiston, sed ilia sorto ne estis certa. La por-esperanta agado de la oĉjo devis esti prokrastita. La internacian lingvon bezonis neniu, la eksterlandaj kontaktoj iĝis suspektindaj, Raszkin lamentis.

### **Germana-sovetia milito**

Kiam en 1941 la germanoj atakis Sovetunion, la aviadiloj ĵetis ankaŭ bruligajn bombojn super Bjalistoko. Felicja Raszkin denove disfuĝis, piede centojn da kilometroj sencele tra la ĉirkaŭa regiono, por serĉi pro-

tekton ĉe fremdaj homoj : « Ĉie la homoj estis same konsternitaj pri la milito. Ili ne povis kompreni, ke Germanio atakis Sovetion, malgraŭ la subskribita pakto pri neagresado », Raszkin notis.

« Ni devis nin gardi ne nur antaŭ la germanaj soldatoj, sed ankaŭ por ne fidi vilaĝanojn. Serĉante vespere tranoktejon, ne ĉiam ni estis akceptataj kun la sama koreco. Okazis, ke oni rifuzis al ni helpon, parolante ke certe ni estas judinoj. Anstataŭ neadi, ni plu marŝis. »

Kiam la sovetianoj fuĝis el Bjalistoko, la nova reĝimo sub la germanoj fariĝis multe pli kruela, ĉar la germanoj celis la forpelon kaj murdon de la judoj. La unuaj bomboj, falantaj sur Bjalistokon, malbridis panikon, same kiel en Grodno. La sovetia militistaro kaj civiluloj laborantaj en diversaj rusaj oficejoj, tute surprizitaj per la militeksplodo, forlasis la urbon tumulte. Ili provis fuĝi per vagonaroj, kamionoj kun soldatoj aŭ per siaj veturiloj. La germanoj mitraladis la vojojn kaj multaj estis pafitaj tuj en la komenco de la fuĝo. Raszkin informiĝis pri la fama kruela krimo de la germanoj, kiuj la 27an de junio enfermis preskaŭ 800 homojn en sinagogo kaj bruligis ĝin : « La vidintoj longe aŭdis terurajn kriojn de la viktimoj, kaj post la sinagogo restis cindro kaj brulnigraj ostoj. La tuta kvartalo estis detruita, kaj en la pogromo oni murdis ĉirkaŭ 2000 judojn. »

### **Vivaĉo en la geto**

La 2an de aŭgusto 1941 oni fermis la pordegojn de la geto. Raszkin :



« Malantaŭ la pordegoj estis alia mondo. Niaj stratoj pli malriĉaj, niaj loĝejoj pli mallumaj, homoj malsataj. Oni senigis niajn okulojn je la tuta verdaĵo de la parkoj kaj herbobedoj, kaj niajn orelojn je ĉiuj sonoj de la kantantaj birdoj. Ni perdis aspekton de la normalaj homoj, kiuj iras sur la trotuaroj. Eĉ la ĉielo perdis sian bluan, ĉar la kapoj ne leviĝis, sed klinis sin al la griza pavimo. La laboro ekster la get fariĝis plej valora, ĝi donis kontakton kun la urbo-vivo pulsanta ĉirkaŭe. Ne plu grava estis loko, nek laboro tie, nur elgliti el tiu ĉi malliberejo! Pro mia laboro ekster la get mi havis fenestreton al la granda mondo. » Dume, la patro de Felicja Raszkin estis deportita, kune kun Jakobo Ŝapiro. Malgraŭ la granda malamo, kiu ekregis en Bjalistoko, Felicja, ne ankoraŭ 20-jara, spertis sian unuan amon – Stefano. Raszkin sincere priskribis siajn sentojn kaj emociojn por li. Sed poste li perdiĝis.

La malfacila kaj naŭza vivado en la bjalistoka geto, en kiu Felicja Nowak pasigis sian plej malfeliĉan vivotempon, estas skizita tra pluraj ĉapitroj. Ŝi mem trovis laboron aŭ en teksejo aŭ en tabakfabriko. Temis pri vivo kun mortverdikto. Regis la fatalismo laŭ jena filozofio :

« – Iel ni saviĝos, la germanoj devas ja malvenki – ni diradis.

– Ili malvenkos, sed ĉu ni ĝisvivos – suspiradis Tolĉsjo. »

Ĉi tiuj germanoj kondukis kiel furioj kaj bestioj en la geto. Ili malhelpis, ĉikanis, sufokis, persekutis, turmentis kaj punis la judojn ĉie kie eblis. Ili pendigis homojn ĉe la

galgo, detruis la geton, sendis pli kaj pli da viktimoj al koncentrejoj kaj neniigejoj kiel Treblinko kaj Aŭŝvico. Por la judoj necesis pripensi kiel savi sin mem. « La aliaj diradis, ke la germanoj kondamnis nin al morto, kaj estas nur la afero de la tempo, kiam ili efektiviĝos la verdikton. Neniu povis forgesi la tragedion, sed eĉ la pesimistoj aŭskultis vortojn de la espero. Mia panjo kredis je la savo kaj ne volis pensi, ke oni plilongigis al ni la vivon nur por kelka tempo. »

Raszkin raportis, ke en 1943 la ribelo en la varsovia geto estis sufokita ; aliflanke la batalo de Stalingrad estis malvenkita por la germanoj, kiuj fariĝis pli kaj pli nervozaj. La krakova geto estis likvidita, kaj en Bjalistoko prepariĝis la translokado de la judoj al Lublino. Feliĉe, Felicja povis eskapi la selektadon.

« La geto prezentiĝis terure. Kadavroj en sango, vunditoj sen helpo. Detruitaj loĝejoj, disĵetitaj mebloj kaj vestoj, rompigitaj fenestrovitroj kaj vitropecoj disfalantaj sub la piedoj. Elrompigitaj pordoj de la malplenaj domoj. Ĉie ŝvebanta plumaro el disfenditaj kusenejoj. Sufoka brulodoro. »

Felicja Nowak havintus la opcion fuĝi el la geto, sed trifoje ŝi revenis, ĉar en la geto loĝis parencoj, inter la plej proksimaj ŝiaj avino kaj patrino, de kiuj disiĝi ŝi ne povis kaj ne volis. Felicja renkontis polajn vilaĝanojn, konatojn de ŝia familio, kiuj helpis per nutraĵoj, sed poste ŝi perdis la kontakton kun ili. Post la morto de la avino ŝi sentis sin treege korligita kun sia patrino, kaj ŝi devis trovi

respondon al la demando ĉu fuĝi aŭ resti. Finfine ŝi decidis forlasi la geton, por savi sin mem.

### **Ekzistado en la kaŝejo**

Vestita kiel pola knabino kun la nomo Valdemara Budz kaj kun falsa vivrakonto Felicja atingis la vilaĝon, kie loĝis la pola sinjoro Petro, kiu pretis kaŝi ŝin en la subtegmentejo de sia domo ĝis la fino de la milito. Por ne esti malkovrita, Felicja apenaŭ povis moviĝi, brui aŭ montri sin. Oni nutris ŝin trifoje tage kaj donis al ŝi iujn okupojn. Fakte, ne ĉiuj loĝantoj de la vilaĝo kompatas la judojn, kaj al neniu alia krom al sinjoro Petro eblis vere fidi. Felicja vivis de tago al tago, fizikajn fortojn ŝi bezonis por subteni sian psikan farton. Ŝi devis batali kun la tempo kaj necesa estis ia okupo por la manoj kaj menso : « Ĉiu okupo en mia solejo estis kvazaŭ savo. Mi kudradis, flikadis, trikadis. Mi legadis ĉion, kion oni alportis por mi. Mi ricevis salutojn de Maria, kiu sendis al mi germanajn librojn. Ne estis facile por mi forgesi la realon, sed legado mildigis ĉe mi zorgojn. »

La vintro estis frosta kaj kvazaŭ senfina. Ne ĉiam ŝi povis dormi. Jam ĉirkaŭ la tria horo posttagmeze griziĝis kaj 18 horojn ŝi kuŝadis en la mallumo. Dum la silvestra vespero, malgraŭ la frostoj, ŝi restis en la kaŝejo. Estis la kutimo viziti unu la alian kaj bondeziri, trinki bimbiron kaj amuziĝi laŭ tradicia maniero. Ĝis malfrua nokto Felicja aŭdis gajajn voĉojn.

La 27an de julio 1944 Bjalistoko liberiĝis de la germanoj kaj la sove-

tiaj trupoj okupis ĝin. Ŝiaj <gastigantoj> timis tro frue malkaŝi ŝin kaj diskonigi sian rolon pri la saviĝo de la judino. Dume, Felicja daŭre sidadis en la subtegmentejo, kvankam ŝi havis la ardan deziron kuri al la urbo por ekscii, kio okazis kaj kiuj de ŝiaj familianoj kaj konatoj estis savitaj. Kiam ŝajnis sendanĝere, Felicja finfine forkuris de la vilaĝo en la urbon, kie ŝi eksciis multajn terurajn novaĵojn. Inter alie, ke la 12an de julio 1941 estis mortpafita sur Petrasze ŝia patro, kune kun oĉjo Jakobo Ŝapiro. El la tuta granda familio restis nur ŝi.

Ŝi ankaŭ ricevis la sciigon, ke naciista bando intertempe atakis la bieneton de sinjoro Petro, kiu estis kruele punbatita. Oni rabis iliajn ĉevalojn kaj bovinojn, traserĉis la kabanon, forprenis pelton, botojn kaj ŝtelis aliajn objektojn. Sed la gemastrojn en la vilaĝo trafis ankaŭ alia sorto. Post la akuzoj pro la kunlaboro kun la Landa Armeo dum la milito sinjoro Petro estis arestita kaj ĉe ili komenciĝis observado.

### **Post la liberiĝo – trista vivo en la komunismo**

Felicja dume forveturis al Moskvo, kie vivis iu onklo kun sia familio. Dum la preskaŭ dujara restado en Moskvo ŝi daŭrigis lernadi por plikleriĝi, kio fariĝis ŝia ĉefokupo.

En majo 1946 ŝi edziniĝis al Jaĉjo Raszkin, kiu estis oficiro de la Pola Armeo. Samtempe ŝi revis reveni al la patrujo, kio efektiviĝis en julio, kiam ŝi forlasis Moskvon. En 1949 ŝi komencis en Poznano vizitadi la du-

jaran artistan lernejon. La diplomo rajtigis ŝin reĝisoradi en amatoraj teatrotrupoj.

Sed ne venis esence pli bonaj tempoj. La vivo sub la komunisma regado evidentiĝis malfacila : « Kreskis la diferenco inter la oficialaj opinioj kaj la propraj pensoj. Estis pli kaj pli grandaj duboj. La malnova kredo, ke estos starigita la ordo kun socia justeco, disbloviĝis. Tamen restis iu naiva espero. Ni eniris la periodon de « malgranda stabiliĝo ». Estis ŝatata laboro kaj agrabla medio, aro da geamikoj, familia angulo, ĝojo pri infanoj kaj penso, ke eble ili vivos pli bone. »

Unua streĉiteco aperis en la jaro 1956, kiam en Poznano eksplodis strikoj, kiuj estis brutale disbatitaj kaj en kiuj pereis homoj. Kun teruro Raszkin aŭskultis la vortojn de la ĉefministro Cyrankiewicz : « Kiu levos la manon kontraŭ la popolregantoj, al tiu la popolregantoj dehakos la manon. » Varmege Raszkin subtenis la liberigajn ideojn en Hungario ; la invado de sovetiaj tankoj en Budapeŝton por ŝi estis despli granda ŝoko. Sed la degelo daŭris mallonge kaj denove ekblovis frida politika vento ĝis nova malagrabla frostoj. Denove la cenzuro forstrekis teksterojn kaj forstranĉis el la bendo preparitajn radio-elsendojn.

En 1967, la okazaĵoj en Proksima Oriento, la milito inter Israelo kaj la arabaj najbaroj subite ŝanĝis ĉion. La vorto « cionisto » fariĝis sinonimo de la vorto « judo ». En la radio la muziko de Arthur Rubinstein malpermesiĝis, same kiel en la teatro la dramo *Dziady* de Mickiewicz. La junularo protestis. En 1968 okazis la

« Praga Printempo ». Estis uzata la nova difino pri la « polarigo de la socio ».

Raszkin memoris : « Kune kun la malboniĝanta ekonomio de la lando kaj senĉesa manko de de plej diversaj varoj sur la merkato en Polujo kreskis la malŝato por la « Granda Frato » kaj ni ĝojis pri tiu fiasko de la sovetia politiko. » Gomułka kaj Moczar verŝis oleon en la fajron. La aŭtoritata komunista ŝtatestro konsideris la judojn kiel « kvinan kolonon » kaj komprenigis al ili malkaŝe, ke Polujo sen bedaŭro adiaŭos al tiu ĉi parto de sia civitanaro. Sekvis nova ondo de diskriminacio de la judoj ; kiel Raszkin raportis, dum kunvenoj en la uzinoj oni akuzadis, kalumniadis kaj eliminis juddevenajn laboristojn el la partio, studentoj estis forpelitaj el la universitatoj, kaj multajn aliajn oni eĉ arestis aŭ senigis de la studrajto. Amase oni maldungis homojn, judaj kooperativoj estis likviditaj, en la armeo okazis purigadoj, kaj oni komencis esplori la devenon de homoj. La poloj konkludis, ke la tuta ideologio pri la supereco de la socialismo, trompe konstruata dum jaroj, fiaskis kaj turniĝis kontraŭ la judoj, kiuj devis esti kulpaj pro ĉio.

### **Penso pri elmigro**

Alvenis la momento, kiam la familio de Felicja Raszkin-Nowak komencis pensi pri foriro el Pollando. Al la edzo ne estis facile akcepti la penson pri elmigro. Sed al la infanoj oni volis evitigi novajn antisemitismajn spertojn. Do, unue Mariano forveturis, duonjaron poste

ankaŭ la filino. Antaŭ ol Felicja mem forlasis Pollandon, ŝi ankoraŭfoje vizitis Bjalistokon por adiaŭi al la muroj de la familia domo ĉe la strato Lipowa 33 kaj daŭrigis al Lublino kaj Majdanek, kie plej verŝajne pereis la patrino. Post hontinde ĉikana esplorado de siaj havaĵoj far la polaj doganistoj kaj sen mono en la poŝo oni finfine permesis al ŝi forveturi. Estis malpermesite kunpreni legitimilon, kiu povus montri dungolokon, sindikaton aŭ asocion. La edzo estis konsiderata kiel portanto de ŝtataj sekretoj. «Oni faris ĉion, por ke niaj lastaj rememoroj estu kiel eble plej malbonaj», Raszkin plendis seniluziigita. La 15an de novembro 1971 Felicja Raszkin-Nowak kaj ŝia edzo forlasis Pollandon por ĉiam por rekomenci la vivon en alia lando.

### Profundaj impresoj

Leginte antaŭ kelkaj jaroj la libron *Mia stelo* en la germana lingvo, mi estis malofte kiel en tiu ĉi kazo ravita kaj profunde impresita. Estas do tre ĝojige, ke ĉi tiu korŝira raporto haveblas nun ankaŭ en sufiĉe bona Esperanto-eldono. Felicja Raszkin-Nowak ne nur rakontis pri si mem, sed liveris ankaŭ multajn informojn pri parencoj, amikoj kaj konatoj, kiuj iel rilatis al ŝia familio. Tiu larĝigo de la atento al senombraj aliaj personoj faras la memuaron despli bunta kaj interesa. Ankaŭ ne mankas multaj koncizaj indikoj pri aktualaj eventoj, kiuj riĉigas la biografion kaj estas utilaj por kompreni la historian kuntekston. Malgraŭ kelkaj pridisputeblaj lingvaj kazoj, kiuj koncernas ĉefe

participojn, akuzativon, objektojn, afiksojn kaj artikolon – Tomasz Chmielik (teksto) kaj Lidia Ligeża (versaĵoj) trovis vere originalan esperantigan solvon, kiu konsistas inter alie en la redono de diversaj tipaj nomoj polaj, judaj, rusaj, belorusaj – homoj nomiĝas Anna Grinberg, Fanny Kahan, Osip Tropp, Njuŝa Breitŝtok, Izĉjo Zbar, Mira Kvasovicer, Mura Szacka, Anjo Hildebrand, Lusinjo Tilleman, Riĉjo Levi, Luĉjo Dojlidzki, Manjo Jeleniewicz, Ester Raĥela Kamnińska, Fimo Meisler, Tomasz Libiszowski, Barbara Krafft, Izĉjo Weintraub, por mencii nur kelkajn. Nacilingvaj nomoj kiel Judenrat, Gestapo, Gestapanoj, SS, Gauleiter, Führerin estis aŭtentike konservitaj. Estas enkondukitaj neologismoj kiel galgo (pendumilo), ŝmugli (kontrabandi), palto (mantelo), holandi (sketi kun balancigado kaj turnigado de la korpo). La tradukintoj do maksimume eluzis la leksikan kaj vortfaradan potencialon de Esperanto – kaj tio estas alloga kaj laŭdinda.

Ne plej laste, grava kaj interesa momento por la historio de Esperanto la libro de Felicja Raszkin-Nowak estas pro tio, ke ĝi rolas ankaŭ kiel omaĝo de samtempa atestantino al la famekonata esperantisto Jakobo Ŝapiro (Szapiro) el Bjalistoko, kiu estis ŝia onklo. Ŝapiro estis la antaŭmilita gvidanto de la Esperanto-movado en la naskiĝurbo de L. L. Zamenhof. Kiel judo li fariĝis viktimo de la nacisocialisma holokaŭsto kaj estis murdita de la faŝistoj en julio 1941 en Bjalistoko. Kvankam Felicja Raszkin ne sciopovis Esperanton, en la koro ŝi certe

kapablis kompreni la signifon de la esperantismo laŭ la maniero praktikata de Ŝapiro, ankaŭ pro tio, ke ŝi rilatis tre senteme al lingvaj kaj etnaj demandoj kaj entute pozitive konsideris la Esperanto-laboron de sia tre originala onklo.

En surpriza postparolo, la fama pola verkisto Andrzej Szczypiorski (1924-2000) sincere laŭdis la rakonton de Felicja Raszkin-Nowak, kiun li konsideris kiel unu el la plej interesaj libroj pri la pereco de judoj kaj pri la rilatoj inter poloj kaj judoj. Li pensis, ke la aŭtorino sukcesis diri tre multe laŭ kredinda maniero sen troigita sentemo, kvankam sentimen-

talaj tonoj neeviteble aŭdiĝas kelkloke. Laŭ li tio estas akceptinda, se oni konsideras, ke la aŭtorino staris rande de la infero kaj pereco. Szczypiorski konkludis, ke « la rakontomaniero de Felicja Nowak estas atentokapta, oni legas ĉi rememorojn ne nur kun dolorsento, ne nur kun kompatemo kaj espero, sed ankaŭ – kion mi opinias plej grava – kun granda intereso. »

*Mia stelo.* Felicja Raszkin-Nowak. Tradukis T. Chmielik, L. Ligęza. Książnica Podlaska im. Łukasza Gónickiego. Białystok. 2011. 189 p. Prezo : 15.60 € (UEA).

## Le peuple des moutons

*La ŝafa popolo :*


*kial svisoj preskaŭ ĉiam voĉdonas kontraŭ sia profito...*

*André Sandoz*

La titolo aludas al la konata patruja kanto *Le peuple des bergers* (La popolo de la paŝtistoj), kiun la knabeto Rémy, lernanto en Les Monts-sur-Le Locle, iam vigle kantis kune kun siaj diversaĝaj kamaradoj : « Brutista popolo, libera sur sia ter'... » Ĉu ankoraŭ libera, sendependa ?, demandas Rémy Cosandey. Parton de respondo jam alportas la bildo sur la kovrilo : mapa Svislando fendetita en ĝia mezo per la stango de aroganta standardo kvazaŭ svisa, sed malvere svisa...

Rémy Cosandey naskiĝis en la jaro 1945 en Le Locle. Deknaŭjaraĝa li jam ekpolitikis. Li plenumos ĉiujn postenojn en sia urbo, ĝis en la Urba Plenuma Konsilio. Dum kvindekda

jaroj li ankaŭ senĉese laboros diversnivele en sindikataj kantonaj organizaĵoj. Li nun loĝas en La Chaux-de-Fonds.



La libro dividiĝas en tri partoj. En la unua la verkisto priskribas sian junecon en laborista familio kaj la devenon de siaj konvinkoj kristanaj, sociaj, sindikataj, ekologiaj kaj pacemaj. En la dua parto, la verkisto analizas la kialon de la stranga paradokso vortigita en la libra subtitolo. La tria parto estas interesa kontribuo de tridek svisaj konatuloj, kiuj skribas ĉirkaŭ po tri paĝojn pri la temo de la libro. Simple alfabeto ordigitaj, la petitaj aŭtoroj prezentas sin mem paĝkape kaj mem titolas sian teksteton. Vi malkovras ekzemple: *André Babey*, neŝatela civitano, Corcelles; *Canisius Oberson*, pastro, Cernier; *Emilie Salamin-Amar*, verkistino, Echichens... Vi ankaŭ trovas *Mireille Grosjean*, pensiulino necedema kaj poliglota, Les Brenets.

Nia samideanino reliefigas la invadon en nia lando de modoj, de

uzoj kaj ĉefe de vortoj *made in USA*. Kvazaŭ internacia lingvo, sed malvere internacia lingvo, ĉar internacia lingvo ne povas esti nacia lingvo. « Sola justa solvo al la lingva multeco estas esperanto », prave skribas Mireille Grosjean. Sekvas ŝia bela kaj verva skizo de nia internacia kaj neŭtrala lingvo, kun citaĵoj el Claude Piron kaj François Grin.

Post la tridek atestoj, la aŭtoro Rémy Cosandey ne plu reprenas la parolon, krom por koncize danki la intervenintojn. La leganto eble miros pri la unisono de tiu tria parto. La verkisto tion decidis elektante siajn kunatestantojn.

Vi mem legu la aktualan kaj necesan libron. Rémy Cosandey konkludas la libron per dediĉo: « Mi dediĉas tiun modestan verkon al ĉiuj, kiuj klopodas por mondo pli justa, pli tolerema, pli pacema, unuvorte pli bona. »

## Novaj komplikaĵoj pro Rumantsch Grischun

*Bruno Graf*

Simone Rau denove raportas en la gazeto *Der Bund* de la 11-a de februaro 2012 pri la lingvodisputo. Mi resumis kaj esperantigis ŝian tekston, kiu montras, ke planlingvo renkontas reziston. Tiu fenomeno interesas esperantistojn.

La kritikantoj diras, ke la unuecigita Rumantsch Grischun (RG), enkondukita 1982, minacas la kvin idiomojn (sursilvana, sutsilvana, surmirana, putera, valadera). La subtenantoj argumentas, ke RG kiel skrib-

ita pontolingvo helpas vivteni la retoromanĉajn idiomojn.

La komunumoj rajtas decidi pri la instruotaj lingvoj, sed la kantono kompetentas pri la instruiloj. Tiel la kantona parlamento en decembro faris decidon por solvi la problemon, nome presigi la instruilojn ankaŭ en la kvin idiomoj, ne nur en RG. Sed la lingvodisputo pludaŭras.

Komunumoj, kiuj siatempe enkondukis RG en la lernejoj, estas nun en dilemo. Ekzemple en la komunumo Sevgein [sevĝajn], kie estas instruita RG, gepatroj kun protesto postulis reinstrui la sur-

silvanan, sed perdis en voĉdonado. Cetere la lerneja konsilio inter la komunumoj Castrisch-Sevgein-Riein [kastrîŝ-sevĝajn-riajn] decidis reinstrui la idiomon. Nun la administra tribunalo okupiĝas pri la afero.

Ŝajnas, ke la rezisto kontraŭ RG kreskas. Se komunumo ne plu volas

instrui RG, necesas fari tion ek de la unua klaso por eviti konfuzon. Ankaŭ pri tiu demando la administra tribunalo okupiĝas. La valo Müstair [mistajr] iam estis pioniro por antaŭenigi RG. En marto la civitanoj devas decidi pri iniciato reiri al la idiomu valadera en la lernejoj.

## La svisa alterna sistemo de metilernado

*Richard Schneller*

*La alterna sistemo de metilernado estas unu el la specialaĵoj de la svisa profesia instruado, kiu cetere similas al tiu en Germanio.*

Dum la formado la koncerna persono akiras la praktikan parton de la metio en entrepreno kaj la teorion en profesia lernejo. Pli ol 200 000 junuloj elektas tiun alternan formadon, kiu povas konduki al federacia atesto pri profesia kapableco, sed ankaŭ al abiturienta diplomo faka kaj poste al la specialigaj altlernejoj. Ĝi koncernas pli ol 200 metiojn.

Tiu modelo iĝis pozitive konsiderata kiel bone adaptita al la nuntempaj devigoj sociaj kaj ekonomiaj de la tutmondiĝo. La OEKE (Organizaĵo pri Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo) eldonis studon en 2009 pri « Lernado per laboro. Taksado de la profesiformada sistemo en Svisio ». Delegacioj el Ĉinio, Hindio, Rusio, Singapuro kaj Finnlando lastatempe studis la svisan sistemon surloke.

Kio do kaŭzas la sukceson de ĉi tiu formado, dum antaŭ nelonge ĝi estis ofte konsiderata nealloga? Svisio estas unu el la landoj havantaj la

plej malfortan senlaborecon de la junuloj 15- ĝis 24-jaraj (3,5 % en januaro 2012), dum la malfacila eniro de eĉ bone formitaj junuloj en la profesion vivon estas unu el la plej gravaj priokupoj en la plejparto de la eŭropaj landoj. En Svisio la junuloj estas trejnataj en konkretaj labor-situacioj kaj akiras profesiajn kompetentojn rekte utiligeblajn, kio poste faciligas la dunguigon. La sistemo ankaŭ rezultigas bonan integriĝon de praktiko kaj teorio, konsiderante ke la sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj konstante evoluas.

En Svisio la profesiaj medioj, kiuj planas pere de siaj asocioj la instruadon de metioj, kunlaboras intense kun la ŝtato (federacio kaj kantonoj). Ne ekzistas netrapentreblaj limoj inter ambaŭ. Ekzemple la privata ekonomio financas la profesion formadon je 40 %.

La alterna formado estas do adaptita respondo al la centraj problemoj de la entreprenoj kiel la konkureneco, la eniro de la junuloj en la profesion vivon, la alta nivelo de kvalifikoj aŭ la lukto kontraŭ manko de kompetenta personaro.

—ooOOoo—

# Indekso enhava de *SES informas* Jaro 2011

Favore al retrovo de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen indekso de la pasinta jaro 2011.

La redaktoro: Claude Gacond.

## Mallongigoj :

e-o = esperanto aŭ Esperanto

e-a = esperanta

e-ista = esperantista

e-isto = esperantisto

i-a = internacia

n = numero

p = paĝo

ps = pseŭdonimo de

tp = titolpaĝoj

vd = vidu

*Titolo de libro aŭ periodaĵo*

## A

Aalen : n1p14-15, n3p19-21.

Adelboden : n4p4, 6-8, 11, 15.

*La Adjektivo ĉe Boethius de Notker* : n1p28.

Aebi Traugott Rinaldo : n2p8.

Afriko : n3p17.

Agado « Vaste kaj Digne » (SES-konto) : n1p4.

Aikido : n3p26-27.

L'Aire (eldonejo) : n4p10.

Ajabe : n3p26.

Akademio de E-o : n2p13.

Alemanio : n2p2, 26, n3p24, n4p22.

*Allegra genügt nicht ! Rätoromanisch als Herausforderung für die Schweiz* : n1p28.

Allemand Luc : n1p7, 14-17, n2p1-3, 8, 11, 25, n3p1, 4, 11, 21, 33.

Allgäu - Algovio : n2p29.

Alpoj : n3p22.

Altherr Anita : n4p21.

Andreae Christiane : n1p12, n2p22.

Antido ps : de Saussure René.

Arany : n1p35.

Areuse : n2tp.

Armenio : n2p16.

Arth-Goldau : n1p2.

Attac-grupoj : n1p4.

Auld William : n1p34-36, n4p13.

## B

Babey Katia : n2p22.

Babits : n1p35.

*Babylonia* : n1p4.

Bachalpsee : n3tp.

Bachmann Louise : n3p5.

Badoux Françoise : n3p6.

Baghy Julio : n1p7, n2p11.

Bagne : n4p10.

Balkanio : n2p14.

Barandovská-Frank Věra : n4p27-28.

Barato : n2p15.

Bartoli Mara : n2p23, n3p14.

Basel - Bazelo : n1p16-17, 36, n2p3, n3p33.

Batrakova Julija : n2p17.

Baumgartner Dorothée : n2p3, n3p1.

Baupierre Henri ps : Vatré Henri.

Baur-Sallenbach Arthur : n1p26-28, n2p1, n3p2, n4p4.

Bausani A. : n4p4.

de Beaufront Louis : n1p7, n2p11-12.

Bélisle Marion : n3p3.

Belov Stanislavo : n1p28-31.

Benino : n2p16, n3p34.

Berger Héléne : n4p19.

Berlino : n4p19.

Bern - Berno : n1p5, 27-28, n2p27.

Berna Ĵurnalista Societo : n1p28.

Bérout-Focke Nicole : n2p21, n3p1.

Béatrix-Koleva (familio) : n4p15.

Bettringen : n3p20.

Bianchi M. : n2p18.

Biaufond : n1tp.

*Biblio* : n3p28, n4p18.

Bickel : n4p5, 7.

Biel : n1p14, n2p5, n3p7.

Blahuš Marek : n1p14, 16-17.

Blanc Maillard Charlotte : n1p12, n2p22, n3p5, 13.

Blanke Detlev : n4p20.

Bodensee : n1p14.

Boichat Suzanne : n4p19.

Bokova Irina : n3p17.

Bolivio : n1p16.

Borel Pierre-Alain : n2p22.

Borgeaud Georges : n4p10.

Bornet Laure : n3p5, n3p6.



Borsboom Ed : n4p11, 13.  
 Bosnio : n2p14.  
 Boulton, Marjorie : n4p13.  
 Bouvier : n4p10.  
 Bratislavo : n1p19, 23-24.  
 Braun August : n4p30.  
 Britio : n1p16.  
 Brno : n1p18.  
 Brun Sonja : n1p13, n2p24.  
 Budapeŝta Skolo : n1p34.  
 Budapeŝto : n1p34, n2p15.  
 Bühlmann David : n1p12, n2p8, 22, n3p5-6, 13.  
*Der Bund* : n3p25.  
 Burri Elisabeth : n2p27.  
 Burundio : n2p15-16.  
*By de Lüt* (televida elsendo) : n2p2.

### C

Carlevaro Tazio : n1p1, n2p8, 10, n3p2, 5, 10, n4p4.  
 Carlevaro Teresita : n2p8, n3p5.  
 Carol Luiza : n4p3.  
 Castelli Giuseppe : n3p1.  
 CDELI – Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia : n1p7, 28, n2p1-2, 4-6, 8-9, 11, 13-14, 22, 27, n3p3, 6-7, 11, 32, n4p3, 4, 15, 20-21, 23, 25-26, 29-30.  
 České Budějovice : n1p18.  
 Cezareo : n3p18.  
 Chaves-Walder Gabriel : n3p1.  
 Chaves-Walder Verena : n1p13, n2p24, n3p1, 15.  
 Cherpillod André : n1p11, n2p30-32, n4p17.  
 Chrdle Petro : n1p18.  
 Cingria Charles-Albert : n4p10.  
 Club 44 : n4p14.  
 Colomb Catherine : n4p10.  
 Comenius : n1p5.  
 Cometta Claudio : n3p5.  
 Common Charmian : n2p4.  
 Conseil des Etats : n1p5.  
 Cop Cosette : n4p7.  
 Cop Raoul : n4p7.  
 Couturat Louis : n1p8-9, n2p12.  
 Creux-du-Van : n4p16.  
 Cseh Andreo : n4p12.

### Ĉ

Ĉapek Karel : n3p28.

Ĉeĥio : n1p25.  
 Ĉilio : n2p16.  
 Ĉinio : n2p15.  
*Ĉu vi konas la Teron ?* : n3p22-24.

### D

Dakaro : n2p26.  
 Danlando : n1p34.  
 Danubo : n1p15, 23.  
 Dasgupta Probal : n4p28.  
 Daubercies Sonia : n1p12, n2p22, n3p13.  
*Deine zweite Sprache* : n1p28.  
 Delegacio por alpreno de Lingvo I-a : n2p12  
 Delémont : n2p2.  
 Descartes - Kartezio René : n1p7-8, n2p3.  
*Didaktika Antologio* : n4p8.  
 Di Vetta Arlette : n4p8.  
 Domo de la Kantonoj : n1p5.  
 Donzé Fernand : n2p22.  
 Dornier Marcel : n2p27.  
 Doubs (rivero) : n1tp.  
 Dovat Lucienne : n2p1, n3p5.  
 Dubach Hans : n2p30.  
 Duc Goninaz Michel : n4p4.  
 Ducret Aïdonidis Laurence : n3p5-6.  
 Dudich Endre : n3p22.  
 Duding Laurent : n2p22.

### E

Echange de Jeunes : n1p5.  
 Eisenegger Elisabeth : n3p5.  
*Ek al la laboro - Passons à l'ouvrage* : n4p10.  
 Ekspozicio pri E-o en Berno : n1p28.  
 Ekspozicio pri E-o en Le Locle: n4p21.  
 Ekström Ilmari : n3p28.  
 Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA : n2p15.  
 Elĉingen : n1p15.  
*Eloge du Migrant - Laŭdo de la Migranto* : n4p10.  
 Elsner Verena : n3p5.  
 Engadino : n3p25.  
 Erasmus : n1p5.  
 Erbetta Marcel : n2p15.  
*La E-isto* : n1p10-11.  
 E-o aŭ Lingvo I-a : n1p8-11, 36, n2p2, 9, 11-13, 16, 27, 30-32, n3p14, 17, 22, 24, 26-27, n4p6, 8-14, 17, 19, 21-24, 26, 28.  
 E-o en la lernejojn : n4p4, 24.  
*E-o in 5 Lehrbriefen* : n1p28.

*E-o-Information* : n1p27-28.

### **E-o organizaĵoj lokaj :**

**Basel** : ESB - E-o-Societo Basel : n1p12, n2p20-21, n3p12.

**Bern** : n1p12, n2p21, n3p13.

**Genève** : n1p22, n2p22, n3p13.

E-o-Grupo La Stelo : n1p12.

**La Chaux-de-Fonds** : n2p21-22.

**La Tour-de-Peilz** : n2p24.

**Lausanne** : Laŭzana E-o-Societo : n1p12, n2p22-23, n3p13.

**Luzern** : Lucerna E-o-Societo : n1p13, n2p24.

**Wil** : E-o-Klubo Wil : n1p13, n3p15.

**Zürich** : E-o-Societo Zürich : n1p13, n2p24, n3p15.

*E-o per Post* : n1p28.

Esperantujo : n4p9.

Etang de Gruère : n4p22.

*La eternaj angloj* : n1p31-33.

*Etnismo* : n2p14, n3p5.

Eŭropo : n2p24, 32, n3p18.

### **F**

Fachstelle Jugendaustausch : n1p5.

Fame-fondaĵo aŭ -premio : n1p14.

Faulensee : n2p30.

Favre Alain : n3p14.

Favre Charles-André : n2p22.

Federacia Palaco : n1p5.

*Femina* : n4p14.

*La fenomeno Svislando* : n3p2.

Fenger Pernille : n3p17.

*Festlibro Gacond 80* : n4p28-30.

Fiaux Monique : n3p5.

Finsteraarhorn : n3tp.

Flawil : n2p8.

Flochon Bruno : n1p16.

Fondaĵo CH : n1p5.

Fondaĵo aŭ Fonds Edmond Privat : n4p15, 20.

FIPAM - Fonduso i-a por la protektado de artoj militaj : n3p26.

FPE - Fonduso Pro E-o : n2p18.

Fontannaz Nancy : n1tp, p7, n2tp, p1-2, 11, n3tp, p1, 11, n4p23.

Francio : n1tp, p16-17, 34, 36, n2p4, 16, n3p19, 26, n4p24.

Friedly Georgette : n3p5.

Friedrichshafen : n1p15.

Fries Clemens : n1p16-17.

*La Fundamento de E-o* : n2p30, n4p17.

### **G**

Gabrielli Lina : n1p36.

Gacond Andrée : n1p34-36, n2tp, n3p5-6, 32, n4p1, 4, 7, 9, 11, 13-15, 19, 24-25.

Gacond Claude : n1tp, p1, 11, 14, 28, 34-36, n2tp, p1-3, 5-6, 9-11, 13, 15-16, 27, n3tp, p2-5, 7, 10, n4tp p4, 7-9, 11-15, 17, 19, 21-26, 29-30.

Gacond Jacques : n4p24.

Gaconda Metodo : n4p26.

Gagnebin Monique : n2p22.

Gandhi Mahatma : n1p36.

Gastejo Edmond Privat : n4p4, 6.

Gaxer Walter : n2p8, n3p5.

Gaza : n3p18.

Gazareth Pascale : n2p22.

*La Gazeto* : n4p14.

Gbadamassi Latifou : n3tp.

Genève - Genevo : n1p4, n2p4, 8, 27.

Geologio : n3p22-24.

*Geologio Internacia* : n3p23.

George Henry : n1p36.

Germanio : n1p14-17, n3p19.

Gessler Claudia : n3p5-6.

Glättli Ernst : n3p5.

Gloor Alexander Adolf : n2p27.

Gloor Alfred : n2p27-30.

Gloor Walter : n2p29-30.

Golden Bernard : n4p4.

Gorecka Halina : n1p14.

Grabowski Antoni : n1p11.

Grabowski Elzbieta : n3p5.

Graf Bruno : n3p1, 19, 25.

*Grajnoj en Vento* : n2p15.

Greutert Kurt : n1p27.

Grindelwald : n3tp, 12.

Grizono : n3p25.

Grosjean Mireille : n1tp, p1-4, 6, 12, 25, n2tp, p1-6, 8-10, 14-16, 22, 26, n3tp, p1-5-6, 8, 10-11, 16-17, 26, n4tp, p21-22.

Grosjean-Maupin Emile : n2p11.

Grossmann Hans-Werner : n2p1, 5, n3tp, p2-3, 6.

*Grüezi mitenand* : n1p28.

Gutiérrez González Maritza : n3p34.

### **H**

Hachette (eldonejo) : n3p13.

Haenni Ueli : n1p12, n2p21, n3p13.

Haifa : n3p18-19.  
 Haitio : n2p16.  
 Haldas Georges : n4p10.  
*Hamleto* : n1p11, n2p11.  
 Hasler John : n3p6.  
 Haupenthal Irmi : n4p16, 30.  
 Haupenthal Reinhard : n1p10, n2p3, 5, 7,  
 n4p4, 16, 28.  
 Haus Christofferus : n1p15.  
 Haus der Kantone : n1p5.  
 Havano : n1p15.  
 Hefti Elisa Rosine : n2p27.  
 Heidenheim : n1p15.  
 Henriko la 4a (reĝo) : n2p16.  
 Hercegovino : n2p14.  
 Herodo : n3p18.  
*Heroldo de E-o* : n2p19, 30.  
 Hilversum : n4p11.  
 Hinda Unio : n2p16.  
 Hirsch Pierre : n4p15, 20.  
*Histoire de la Langue universelle* : n1p8.  
*L'Histoire dérobée - La rabita Rakonto* :  
 n4p10.  
 Hodler Hector : n1p7, n2p11, n4p6.  
 Hoerkens Eugen : n2p8.  
 Homaj Rajtoj : n2p14.  
 Homaranismo : n3p12, n4p8.  
 Huĝimoto Masumi : n4p12-13.  
 Huĝimoto Tacuo : n4p12-13.  
 Huguenin François : n3p5.  
 Huguenin Noël : n2p8, n3p5.  
 Humair Jacques-André : n4p29.  
 Humbert-Fink Yvette : n3p5-6.  
*Hungara Antologio* : n1p35.  
*Hungara Vivo* : n1p34, 36.

#### Ĥ

Ĥohlov Nikolaj Ivanoviĉ : n4p13.

#### I

*Idiom neutral* : n1p11.  
 Ido : n2p12-13.  
 Itis (eldonejo) : n2p5, n3p7, n4p28, 30.  
*Infero* (Dante) : n1p34.  
 Interlingua : n2p13.  
 I-a Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA :  
 n2p4, 15.  
 I-a E-ista Skiferio : n4p7, 11.  
 IEI - I-a E-o-Instituto : n4p11.  
 IFA - I-a Feria Altlernejo : n4p4, 11.  
 Infoterm - I-a Informejo por  
 Terminologio : n3p16.

IKEL – I-a Komitato por Etnaj Liberecoj :  
 n2p14.  
 ILEI - I-a Ligo de E-istaj Instruistoj :  
 n2p14, 16-17, n3p11, n4p24, 29.  
*La I-a Lingvo* : n2p13.  
 I-a Naturamika Semajno : n2p19.  
 ISA - I-a Organizo pri Normigado : n1p21,  
 n3p16.  
 Interreto : n2p16, n4p21  
 Irano : n2p15.  
*Israela E-isto* : n3p18  
 Israelo : n3p18.  
 Italio : n1p34, n4p10.

#### J

Jacob Hans : n4p6.  
 Jansen Wim : n2p14.  
 Janton Pierre : n4p4.  
 Japanio : n2p14, n4p21.  
*Jarlibro de UEA* : n2p3.  
 Jasnaja Poljana : n1p36.  
 Jerusalemo : n3p18-19.  
*Jubilea laŭdo por Gacondo Klaŭdo* :  
 n4p27-28.  
 Jugoslavio : n2p15.  
 JES - Junularo E-ista Svislanda : n1p3,  
 n2p3, 6, n3p1, 4.  
*Junulkurso de SAT* : n4p22

#### Ĵ

Ĵuraso : n1tp, n4p9, 12, 15.

#### K

*Kajeno* : n2p27-29.  
 Kalingrad : n1p14.  
 Kalocsay Kálmán : n1p7, 34-36, n2p11,  
 n4p11, 19.  
 Kameoka : n3p26.  
 Kampanjo E-o en la lernejojn : n4p24.  
 Kanado : n1p16.  
 Katalunio : n2p14.  
 Keller Stefano : n1tp, p4, n2tp, p1-2, n2p3-  
 5, 8, n3tp, p1-2, 4-5, 7, 11, 16-17, n4tp,  
 p28.  
 Kenn Wong : n2p13.  
 Kivi Alexis : n3p27.  
 Klee Paul : n2p32.  
 Knie-bestĝardeno : n3p8.  
 Köpflingen : n1p15.  
*Kolekto de poŝtmarkoj* : n3p28-32.  
 Koller Alois : n3p5-6.  
 Komenius - Komenio : n4p3.

*Kompleta gramatiko detaloza di la linguo internaciona Ido* : n2p12.  
*Konciza Etimologia Vortaro* : n1p11.  
 Konferenco de la Kantonoj : n1p5.  
 KAEST - Konferenco pri Aplikoj de E-o en Scienco kaj Tekniko : n1p18-25.  
 Kongo : n2p16.  
 Konstanz : n1p14.  
 Kopenhago : n3tp, p16-17.  
 Korĵenkov Aleksandr : n1p14.  
*Korano* : n4p18.  
 Kostariko : n2p16.  
 Kosztolanyi : n1p35.  
 Ksavero Francisko : n4p17.  
 Kubo : n1p12, 16, n2p3, 16, 22, n3tp, p19.  
 Kufer Jean-Louis : n4p10.  
 KCE = Kultura Centro E-ista : n2p18-19, n3p4, 7, 12, n4p4, 6, 9, 11, 15-16, 21-23, 29-30.  
 Kultura Semajnfino E-ista : n1p34-35.  
*Kuris lupoj laŭ la stratoj...* : n1p29-31.  
 Kvinpetalo : n4p5, 11.

#### L

La Chaux-de-Fonds - Ĉaŭdefono : n2p1-3, 5, 8, 14, 18, 27, n3p3, 7, 11-12, 20, 33, n4p4-5, 9, 11, 14-15, 19, 24-25, 29-30.  
*Der Landbote* : n1p28, n3p2.  
 Landiswil : n2p30.  
 Lapenna Ivo : n1p34, n4p6.  
 La Sagne : n2p8, n3p3, 7, 33, n4p16, 24.  
 Latinameriko : n2p16.  
 La Tour-de-Peilz : n1p13.  
 Lausanne - Laŭzano : n1p34-35, n3p4, 9, 22, 24, 33, n4p9.  
 Lauteraarhorn : n3tp.  
 Lavanchy Jean-Jacques : n3p5-6.  
 Leau Léopold : n1p8.  
 Lebrun Victor Anatoleviĉ : n1p36.  
 Leibniz - Lebnico Gottfried Wilhelm : n1p7-9, n4p3, 8.  
 Le Locle : n2p2.  
*Leo Tolstoj, la homo, la verkisto kaj la reformisto.* n1p36.  
 Lépine Mario : n4p22.  
 Le Puy-Sainte-Réparate : n1p36.  
 Les Brenets : n2p2-4, 6.  
*Lettres au pendu - Leteroj al pendumito* : n4p11.  
 Lévy P : n4p4.  
 Lia Rumantscha : n1p4, n3p26.

Libra Foiro : n4p10.  
*Libro de Amo* : n4p11.  
 Ligo de E-o en Israelo : n3p18.  
 Ligo de Nacioj : n2p13.  
*La Limsaltanta Folio* : n2p13.  
*Lingvaj respondoj* : n2p13, 31.  
*Lingvo Internacia* : n1p10-11.  
*Literatura Mondo* : n1p34, n4p8.  
*La Litomiŝla tombejo* : n4p23.  
 Littré : n2p32.  
 Londono : n1p28.  
*La Longa vojo* : n4p23.  
 Lucerno : n1p27, n3p33.  
 Ludovikito : n1p10.  
*Ludovikologia dokumentaro* : n1p11  
 Lugano : n1p1-3, n2p4, 6, 10, 20, n3p1, 10.  
 Lukaŝ Miloŝ : n3p28.

#### M

MacGill Stefan : n2p17.  
 Macke August : n2p32.  
 Maertens Grégoire : n4p6.  
 Maison des Cantons : n1p5.  
 Mamin Jeanne : n2p8.  
 Maradan Mélanie : n1p18, n3p16.  
 Margot Nicole : n1p5, n2p4, 14, 23, n3p2, 4-5, 9, 11, 13-15, 22, n4p9.  
 Maribor : n4p24.  
 Martinelli Perla : n2p18-19.  
 Matanzas : n2p16.  
 Matejka Alphonse : n4p19-20.  
*Le Matin* : n4p10.  
 Mayer Herbert : n4p4.  
 Meersburg : n1p15.  
 Meier Hans : n3p5.  
 Meizoz Jérôme : n4p11.  
 Meksiko : n2p15, n3tp.  
 Mercanton : n4p10.  
 Mersenne (Patro) : n1p7-8.  
 de Mestral Dominique : n3p1.  
 de Mestral Elisabeth : n2p3, n3p1.  
 Meye Richard : n4p23.  
 Miĥalski Eŭgeno : n4p13.  
 Modra-Harmónia : n1p17-19, 22.  
 Moilliet Louis : n2p32.  
 Molnár Mónika : n1p7, n2p1, 4, 11, n3p11, n4p26.  
*Monata Cirkulero de KCE* : n4p4.  
*Monato* : n4p14, 18.  
 Monda Soci(al)a Forumo : n2p26.  
 Mongolio : n2p16, 24.

Mont-Soleil : n4p24.  
Moritz Uwe : n2p14.  
Morocz Piroska : n3p5.  
Moskvo : n1p36.  
Moutier : n2p30.  
Münger Marie-Louise : n1tp, p4, n2tp, p1,  
5, 8, n3tp, p1-2, 6, n4tp, p9.  
Mulhouse : n2p4.  
Muri : n2p30.

## N

Nancy : n1p16.  
Nederlando : n1p34, n4p11.  
Nekrasov Nikolaj : n4p13.  
Nepalo : n2p15-16, n3tp.  
Neuchâtel - Neüşatelo : n1tp, p28, n2p2,  
32, n4p14, 24.  
*Neue Berner Zeitung* : n1p28.  
*La nica literatura revuo* : n3p28.  
Nilsson Bertil : n2p19.  
Nollen Barbara : n1p14-17, n3p19-20.  
Nosková Katarina : n1p19.  
Nourmont Claude : n4p11.  
Numminen Ahto : n3p28.

## O

Obraztsov Kontantin : n1p25.  
Occidental : n2p13, n4p19.  
Oertle Karin : n3p5.  
Okamoto Mitsuo : n1p25.  
*La Ondo de E-o* : n1p14, n4p14.  
Oomoto : n3p26-27.  
Ó Rian Seán : n3p16.  
Ortelli Luciano : n3p6.  
Oslo : n1p25, n3p23.

## P

Packongreso en Oslo : n1p25.  
*Le Pain du silence - Pano el silento* :  
n4p10.  
Parizo : n1p4, 28, 36, n2p27-29, n3p26,  
n4p10.  
Pasporta Servo : n1p3, 15, n2p6, n3p1, 4.  
Pasquali Adrien : n4p10-11.  
Pekino : n4p4.  
Peneter Peter ps : Kalocsay Kálmán.  
Pérez Régulo Juan : n1p34, n4p16.  
Périgourdin : n3p5.  
*Perkoresponda kurso de E-o* : n4p21-23,  
25.  
Perrenoud René-William : n1p28.  
Petöfi : n1p35.  
Piç Karolo : n4p12, 23.

Piron Claude : n2p13, n4p3, 4, 8, 24, 30.  
Pirro : n1p7.  
PAG - *Plena Analiza Gramatiko de E-o* :  
n4p18-19.  
PIV - *Plena Ilustrita Vortaro de E-o* :  
n1p18, n3p4, 23, n4p18.  
*Plena Vortaro de E-o* : n1p11.  
Pochanke Barbara : n1p14, n2p24, n3tp,  
p6.  
Pochanke Stanislaw : n1p14.  
Pokhrel Alinka : n3p34.  
Poprad : n1p18.  
Portmann Braun Antoinette : n3p6.  
Prago : n1p18.  
*Praktische Sprachlehre des Schweizerdeut-  
schen* : n1p28.  
*Pri la planlingvaj esploroj* : n4p8.  
Privat Edmond : n1p7, 27-28, n2p11, n4p6,  
12, 17-18.  
Privat Yvonne : n4p15.  
Pro Litteris : n1p28.  
Pully : n4p9.

## R

Radio Genève : n1p27.  
Ramuz Ferdinand : n4p10.  
Randin François : n1p12, n2p3, 5, n2p22,  
n3p10, 13.  
Rao Giridhar : n2p15.  
Rau Simone : n3p25.  
Ravensburg : n1p15.  
Reale Cesco : n1p13, n2p4, 24.  
Rejno : n1p17.  
Rejnvalo antaŭa : n3p25.  
Renens : n1p34-35, n4p9.  
*Revolucio en la lernejo* : n4p9.  
*La Revuo* : n2p13.  
Rey Anna : n1p12.  
Rey Hans : n3p5.  
Rey Koni : n1p13.  
Richterswil : n1p4, n3p3, 8, 33.  
Riggisberg : n2p30.  
Rijal Parashar : n3tp.  
Riond Manuel : n2p23, n3p14.  
Rivière Jimmy : n3p5-6.  
Rochat-Girod : n2p8.  
Roesser Michael : n1p13, n2p24.  
Romandio : n2p2, n4p4.  
Rooke Dieter : n3p3-4, 6.  
Rosendahl Halvor : n3p23.  
Rossetti Reto : n1p31-33.

- Rossi Nicolas : n2p28.  
 Roud : n4p10.  
 Ruĝa Maro : n3p18.  
 Rumantsch Grischun : n3p25-26.  
 Rusio : n1p29-30, 36.
- S**
- Sabijumva Jeremie : n2p15.  
*La Sago* : n4p18.  
 Saint-Imier : n2p2.  
 Saint-Louis : n1p16.  
 Sandoz André : n2p2, n3p5.  
 Sandoz André (urba prezidanto) : n4p30.  
 Sankt-Gallen : n3p4.  
 Sankt-Peterburgo : n1p29-30.  
 de Saussure René : n1p7, n2p11-13.  
 Savojo : n3p24.  
 Schäbisch Gmünd : n3p20.  
 Schäffer Martin : n2p15, n3p34.  
 Scherer Paul : n2p24, n3p5-6.  
 Schleyer Johann Martin : n1p7.  
 Schnelle-Moritz Ursula : n2p14.  
 Schneller Martine : n4tp, p7, 29.  
 Schneller Richard : n1tp, p29, n2tp, p2, 4, 27, n3tp, p1, 22, n4tp, p7.  
 Schöni-Bartoli Daniel : n2p23, n3p9, 14.  
 Schreckhorn : n3tp.  
 Schwartz Raymond : n4p13.  
*Schwyzertütsch* : n1p28.  
*La Sekreto de Lasko - Le Secret de la forêt de Lascaux* : n3p5.  
 Senegalio : n2p26.  
 SAT – Sennacieca Asocio Tutmonda : n1p3, n2p4, 6, 11, n3p1, 4, n4p4.  
 SAT-Amikaro : n1p3, n2p4, 6, n3p1, 4.  
*Sennaciulo* : n4p14.  
 Sennhauser Leonie : n2p8.  
*Sep fratoj* : n3p27.  
 Serrières : n2p32.  
 Setälä Vilho : n3p28.  
 Shakespeare : n1p11.  
 Siberio : n1p29.  
 Silfer Giorgio : n2p18-19.  
 Silva Pablo Fernandes : n2p8.  
 Simpozio pri Homaranismo : n2p19.  
 Slovakio : n1p18, 22.  
 Smolenice : n1p23.  
 Socialista partio : n4p14, 25.  
*SonSESio Voĉoj el Svislando - Songazeto de SES* : n2p5.  
 Sovetio : n1p14.
- Spitteler Carl : n2p29.  
 Stäli Francis : n2p22.  
 Ständerat : n1p5.  
 Stockholm : n1p27-28.  
 Strasburgo : n1p16.  
 Strážnice : n1p18.  
*Structures linguistiques et accusatif* : n4p25.  
*Studoj* : n4p4.  
 Stuttgart : n3p19.  
 Suchard Philippe : n2p32.  
*Sud-Rejna Kuriero* : n2p21.  
*Südostschweiz* : n3p26.  
 Suez-kanalo : n2p32.  
 Sully Duko : n2p16.  
 Suonuuti Heidi : n1p21.  
 Svane Eskil : n3p5.  
 Svedio : n1p10.  
 Svisa Asocio por Unuiĝintaj Nacioj : n1p28.  
*Svisa Enciklopedio Planlingva* : n3p18.  
*Svisa E-o-Revuo* : n1p27, n4p5.  
 SES – Svisa E-o-Societo : n1p26-27, n2p1-10, n3p1-6-7, 15-16, n4p28-30.  
 SES-Ĝenerala Kunveno : n1p1-6, 27.  
*SES informas* : n1p4-5, 25-27, n2p2, n2p2-3, 5, 8, n3p3, 7, n4p9, 14.  
*Svisa Espero* : n1p27, n4p9.  
 SFERO - Svisa Feria E-a Renkontiĝo : n1p3-4, n2p3, 5-6, n3p1, 3-4, 8.  
 SIS - Svisa ILEI-sekcio : n1p3, n2p1, 6, 14-15, n3p1, 3-4, 11.  
 Svisa Ĵurnalista Asocio : n1p28.  
 Svisa Ĵurnalista Unuiĝo : n1p28.  
 Svisa Koruso : n2p3, 23.  
 Svisa Kurtonda Servo : n1p27.  
 Svisa Muzeo de la Ludoj : n1p13, n2p24.  
 Svisa Nacia Biblioteko : n1p28.  
 Svisa Nacia Unesko-komisiono : n1p28.  
 Svisa Packonsilio : n1p28.  
 SRI - Svisa Radio I-a : n1p26, 34, n3p2, n4p4, 25.  
 Svislando : n1p1, 17-18, 26, 34-36, n2p2-4, 8, 13, 15, 28, 30, n3p2, 4, 8-10, 13, 19, n4p4, 8-9, 13, 17.  
 Svitavy : n1p24.  
 Szép : n1p35.  
 Szerdahelyi István : n1p7, n2p11, 13, 15, n4p4.

Ŝ  
Ŝemer Josef : n3p18.

## T

Talingen : n1p15.  
Tanner Adrian : n2p8, n3p5.  
Tarkony Lajos : n1p34.  
Tel Avivo : n3p18-19.  
*Le Temps* : n1p5.  
*Terminologia gvidilo* : n1p21.  
Thapaliya Devi : n3tp.  
Thum Jeannette : n4p7.  
Thum John : n4p7.  
Tiĉino : n1p1-2, 16, n2p2, n3p2, 5.  
Tirana : n2p14.  
Tjumeno : n1p29.  
Togolando : n2p16.  
Tolstoj Leo : n1p36.  
Tonkin Humphrey : n3p16.  
Torabi Reza : n2p15.  
*Tragedio de l' homo* : n1p35.  
Trimbach : n2p30.  
Trompeter W. H. : n1p10.  
Tunizio : n2p32.  
Turkeстано : n1p30.  
TEJO = Tutmonda E-ista Junulara  
Organizo : n4p11.  
Tyrannosaurus rex : n3p23.  
Tzaut Olivier : n4p24-25, 30.  
Tzaut Suzanne : n4p24.

## U

Ulm : n1p15, n3p19-21.  
Unesko : n3p16-17.  
Universal Glot : n1p7.  
UEA – Universala E-o Asocio : n1p4, 27,  
n2p1, 3, 5, 17, n3p10, 16-17, 22, n4p6, 28-  
29.  
UK - Universala Kongreso de E-o : n1p12,  
15, 27-28, n2p3-4, 22, n3p16-17, 19 34,  
n4p19.  
Universala Poŝta Unio : n4p17.  
Universitatoj : n1p28.  
*Unua Libro* : n1p11.  
UN - Unuiĝintaj Nacioj : n1p4, 12, n2p1,  
4, 8, n3p16-17.  
UFE – Unuiĝo Franca por E-o : n1p4.  
Upsala : n1p10, 28.  
*Urax und Rezabell* : n2p27, 29.  
Uzbeki(stan)o : n1p36, n2p16.

## V

Van Dijk Els : n4p13.

Van Pujenbroek Ruth : n3p5.  
Varsovio : n4p4.  
Vatré Henri : n1p34, n4p16.  
Vatré Madeleine : n4p16.  
Verein Schweizerdeutsch : n1p28.  
Vevey : n3p33.  
Vieno : n1p19.  
Vietnamio : n2p16.  
Vigny Marc : n3p5.  
Vikipedio : n1p20-21, 24, n3p2, 23-24, 27.  
Viredaz Marguerite : n2p8, n3p5.  
Vité Paula : n3p5.  
*Viva la Grischa : ein Wegweiser für das  
Bündnerromanische* : n1p28.  
*Vivo en Grizono* : n3p26.  
Vladivostoko : n1p36.  
Volapük : n1p7-9.  
Von Büren Jean-Thierry : n4p22.  
*Von der Utopie zur Wirklichkeit :  
Geschichte der Plansprachen* : n1p28.  
Von Wahl Edgar : n2p13.  
Vordemwald : n1p4.  
Vue-des-Alpes (pasejo) : n4p14.

## W

Wandel Amri : n3p18.  
Waringhien Gaston : n1p7, n2p11-12,  
n4p13.  
*Was ist eigentlich Schweizerdeutsch?* :  
n1p28.  
Weidmann Dietrich : n1tp, p3-4, n2tp, p2,  
4-6, n3tp, p1-2, 4, n4tp.  
Weidmann González Nelida : n1tp, n2tp,  
p5. n3tp, p1, 3, n4tp.  
Weidmann Linda : n3p3.  
Weil am Rhein : n1p17.  
Weingarten : n1p15.  
Wick Bertrand : n1p16.  
Wil : n1p14, n2p1-2, 24, n3p4, 33.  
Winterthur : n1p28.  
*Wochenblatt von Pfäffikon* : n1p28.

## Y

*Yelabuk pedipedelas* : n1p8.

## Z

Zamenhof Lazaro Ludoviko : n1p7-11, 34,  
n2p4, 13, 17, 31, n4p8, 12, 18.  
Žilina : n1p18.  
Zumikon : n2p27.  
Zürich - Zuriko : n1p19, 28, n2p29.  
Zurika Ĵurnalista Societo : n1p28.  
Zuwu Han : n2p15.



La ekzamenatoj en la CDELI-salono dum la Tutmonda KER-ekzamensesio de la 9-a de junio. Ilin fotis Monika Molnar.



Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard flore gatulitaj pro sia priekspozicia laboro dum la vizitado de la SES-anoj kunvenontaj. Videblas iliaj ekspozici-paneloj. Foto de Claude Gacond.